

ĀĀĀOSLOVAKA

ESPERANTO

REVUO

la **progreso**

JARO XIV. NRO 7-8.

Septembro-Oktobro 1932.

APERIS 31. X. 1932.



OFICIALA ORGANO DE ĀĀĀOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOĀĀAŘSKĀ 333

Jarabono (10 numeroj) KĀ 20.—; fremdlando KĀ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

NEZNALOST CIZĀĀ JAZYKŬ.

(Z knihy Otty Jespersena „Eine internationale Sprache“.)

AĀkoliv jsem velkou Āást Āivota ztrĀvĀl tĀm, že jsem se uĀil rŭznŭm řeĀem, pŕece jsem byl Āasto nucen odložitĀ beze ĀtenĀ knihy, kterĀ bych byl rĀd studoval, protože byly tiŝtĀny v řeĀĀ, kterou jsem dostĀ neznal.

Kant (1724—1804) se stal v Edinburgu znĀmŭm teprve v roce 1803, a to nikoli v nĀmec-
kĀm originĀle, nŭbrž francouzskŭm pŕekladem. John Stuart Mill dovedl ĀĀstĀ nĀmeckĀ spisy, tŕebas s obtĀzemi, ale radĀji ĀetĀ pŕeklady, a nikdy se nedorozumĀl na nĀmeckĀm nĀdraŝĀ. Kdyŝ Carlyle se setkal s Louis Blancem, bylo zĀbavnĀ poslouchatĀ, jak se bavĀli. Carlylova francouzŝtĀna byla doslovnŭm pŕekladem jeho vlastnĀ nepŕeložitelnĀ angliĀtĀny, kterou mluvil skotskŭm pŕĀzvukem. Louis Blanc mu vŭbec nerozumĀl, ale rĀd ho vyslechl a odpovĀdal mu, jak mohl. Faraday neumĀl nĀmecky a spisy Roberta Mayera a Helmholtze byly pro nĀho „knihami se sedmerou peĀetĀ“. Dean Stanley řekl: „Jak docela jinak by se byly vyvinuly dĀ-
jiny anglickĀ cĀrkve, kdyby Newman byl umĀl nĀmecky“. Kdyŝ Zola za Dreyfusovy afĀry prchl z Francie, nemohl se vŭbec anglicky domluvitĀ. StejnĀ se vedlo dĀnskĀmu bĀsnĀkovi Heřmanu Bangovi, kterŭ zemřel r. 1912 v Americe v bĀdĀ, nejsa s to svĀmu okolĀ vyjĀdŕitĀ ani svĀ nejjed-
noduŝŝĀ pŕĀnĀ.

TakĀ mezi stĀtnĀky se najde podobnŭ nĀdo-
stĀtek jazykovŭch znalostĀ. Kdyŝ kolem polo-
vice minulĀho stoletĀ bylo DĀnsko v tĀŝkĀ po-
litickĀ situaci, bylo pŕy to pro nĀ zahanbujĀcĀ,
že Madvig, velkŭ latinista, a jinĀ ministŕi u-

mĀli pŕaŝpatnĀ francouzsky a stŭdĀli se takovou francouzŝtinou vyjednĀvatĀ s cizĀmi vyslanci. PodobnĀ zprĀvy mĀme ze svĀtovĀ vĀlky. Sir Eduard Grey neumĀl francouzsky a francouz-
skŭ vyslanec Cambon mluvil zase chatrnĀ ang-
licky. KromĀ lorda Kitchenera ŝĀdnŭ z fran-
couzskŭch a anglickŭch generĀlŭ neumĀl trochu
sluŝnĀ řeĀ druhĀho, a pŕi mĀrovĀ konferencĀ
mĀl ClĀmenceau nadmĀrnŭ vliv, ponĀvĀdž byl
takŕka jedinŭ, kterŭ umĀl obĀ řeĀĀ dokonale. RozumĀ se, že dŭvĀrnĀ hovory mocnŭch stĀtnĀ-
kŭ rŭznŭch zemĀ o dŭleŝitŭch vĀĀech pozbŭvajĀ
vŭznamu, kdyŝ se vedou pŕostŕednictvĀm tĀ-
lumoĀnĀkŭ. Bylo by lepŝĀ, kdyby mocnĀ tohoto svĀ-
ta mohli se po strĀnce jazykovĀ sejĀtĀ na poli
stejnŭch podmĀnek, ale to je moŝnĀ jen pomocĀ
jazyka ŭplnĀ neutrĀlnĀho. JeŝtĀ sprĀvnĀ, že jsou
pŕekladatelĀ a tlumoĀnĀcĀ, ale dobĀĀ a vyhovujĀcĀ
tlumoĀnĀcĀ nejsou ani ĀetnĀ ani lacinĀ. V knize
Miss PankhurstovĀ Ātu, že v roce 1926 bylo mezi
ŭřednictvem Svazu nĀrodŭ v ŽenevĀ 29 pŕekla-
datelŭ a tlumoĀnĀkŭ, kterĀ dohromady dostĀvalĀ
sluŝnĀ 19.900 liber ŝterlĀnkŭ. A pŕece je Svaz
nĀrodŭ jenom skromnŭ zaĀĀtek onĀ rozsĀhlĀ or-
ganisace celĀho svĀta, kterĀ teprve musĀ bŭtĀ
utvořena.

V nynĀjŝĀ dobĀ lacinĀho cestovĀnĀ, obchod-
nĀho styku mezi vŝemi dĀly svĀta, letadel a ra-
dia, mezinĀrodnĀ vĀdy a politikŭ, jeví se jako
nalĀhavĀ nutnĀ pro obchodnĀky, technĀky, uĀen-
ce, literĀty a politikŭ, mĀtĀ snadnŭ pŕostŕedek
pro styk s cizĀnou a nauĀitĀ se od nich vĀce,
neŝ by bylo moŝno, kdyby se cizĀmi zemĀmi

cestovalo tak jako to dělají turisté řeči neznající. Slovo „internacionální“ bylo vytvořeno teprve v roce 1780 J. Benthamem. Nyní přišel čas, nutící k podpoře mezinárodní řeči.

Rád bych se zde také zmínil o mluvícím filmu, který se počíná vyvíjet ke vzácné technické dokonalosti. Když Petersenův a Poulsenův fonofilm byl předváděn v Kodani malému počtu diváků, myšlenky mé putovaly do oné doby, kdy bude možno tímto způsobem řeči a diva-

delní kusy předvésti zraku a sluchu celého světa, tedy spojití výhody kina a radia, a ještě je zvýšiti světovou řeči společnou všem.

Dřeložil Rudolf Friedrich.

Poznámka: Otto Jespersen, narozen r. 1860, profesor angličtiny na universitě v Kodani, jeden z největších jazykozpytců, propaguje svou mezinárodní umělou řeč Novial.

JANKO JESENSKÝ:

LIZO.

Antaŭ ses monatoj mi edziĝis kaj nun mi estas en frenezulejo. Vi ne kredas, sed estas tiel. Mi mem ne kredas kaj tamen mi sidas ĉi tie sur peza blanka benko. Mi sidas, sidas kaj meditas, kaj centfoje dum horo mi trameditas mian vivon. Estas al mi malgaje, kaj ankaŭ ridinde.

Antaŭ jaro oni translokis min en stacion Ján. En januaro mi okupis la postenon. Ĝi estis budo kun du ĉambretoj kaj kuirejo. Kvar etaj fenestretoj kaj unu truo por eldoni veturbiletojn. Ĉirkaŭ ĝi arbetoj de jasmeno kaj kvin maldikaj robinioj.

Densa neĝo estis ĵus falanta, kiam mi venis. Malgranda ŝtata budo estis jam preskaŭ ĝis duono en ĝi. Sur ruĝaj fenestrokadroj kaj vitroj estis multege da ĝi algluita. Palisoj de barilo kaj fervojaj pordegoj apenaŭ estis videblaj. Sur kolonetoj altaj neĝaj ĉapoĵ, kaj kien ajn vi rigardis, ĉie neĝo. Proksimaj altaj montoj de ĉiuj flankoj estis vualitaj en netravedebla blanka vualo.

Ĉirkaŭ vespero ĉesis neĝi. Ekblovigis vento kaj ĉie ĝi jam muĝis. Arbaroj susuris, telegrafaj draĵoj senĉese ĝemfajfis, jen pli forte, jen pli malforte, en reloj de tempo al tempo ekkrakis. Arboj kovritaj de neĝo balanciĝis en malgranda korto, kiel blankaj figuroj. Fervoja pordego tremis kaj knaris. Sur ĉielo eĉ ne steleto. Mallumo.

Al mi estis malgaje. Mi eniris malaltan ĉambreton, lumigis lampon, kaj aŭskultis. — Helaj bildoj, kiujn mi iam ofte estis vidanta, traflugadis mian ka-

pon. Venis je mia memoro la lumigitaj pavimoj de la urbo, kiun mi forlasis. Mi vidis en la spirito, kiel falas neĝo, neĝo malpezeta, eta. Ĝi flirtas super larĝa ŝtrato, sur kiu iras homoj. Sinjoroj en nigraj manteloj kun blankaj ŝalaj ĉirkaŭ la kolo, sinjorinoj en peltoj kun vulpaj vostoj sur la ŝultroj. Vangoj ruĝe pinĉitaj de vento. De tempo al tempo en kriado de vendantoj estas aŭdebla malforta galopo de ĉevaloj, post ili obtuze bruas kovrita, brilanta kaleŝo. Tra ĝiaj fenestroj flugaperis blankaj vestoj, bukedo da floroj. Oni veturas en balon aŭ en teatron... Kafetoj kun vaporigantaj trinkaĵoj, hoteloj kun ridantaj gastoj, ciganoj, kantado...

Angore estis al mi. Turmentis min spiro kaj mi preskaŭ volis ekplori. Neniam mi forĝos ĉi tiun unuan vesperon en Jána stacidomo. La sekvinta tago estis ĝuste la sama. Pasis semajno kaj mi estis ankoraŭ ĉiam malgaja. Eble mi eĉ ne ĝajniĝus, se mi ne estus edziĝinta.

Mi edziĝis filinon de instruisto el la vilaĝo Ján, Sonjon. Bona knabino, neniel salona belulino, maldika, fortosta. Tia vilaĝa. Glata frizaĵo. Kvazaŭ mi ŝin antaŭ mi vidus. Dikaj, rondformaj vangoj kaj mallarĝaj, grizaj okuloj. Nazo eĉ ne iomete bela, sed en la vilaĝo la plej bela. Plenformaj lipoj. Unuvorte vilaĝa. Hela rubando tra la haroj, kaj ŝi havis tian mallongedaŭran, mallautan agrablan ridon...

Mi eliras al persona vagonaro. Neĝblovado ega. Vento forprenadas al vi la ĉapon. Oni devas ĝin per mano teni. La vagonaro tute neĝkovrita. Mi ĝin forsendis, kaj mi vidas, kiel ŝi ploras

ĉe maldika robinio. Grandan skatolon ŝi metis al la piedoj kaj viŝas al si per poŝtuko la okulojn. — El Ján ne venis glitveturilo, kiamaniere ŝi iros hejmen? Mi akompanis ŝin. Oni devis ion paroli, kaj mi rakontas, kiel malgaje estas al mi en la stacidomo. Ŝi diras, ke al ŝi estas hejme gaje. Vespere ili ŝpinas, plumaron ŝiras, kantas. Kelkfoje venas de paroĥejo Anjo, kelkfoje ŝi iras al ili. Venas ankaŭ aliaj, ankaŭ gejunuloj kaj oni ludas „mi koleras je vi“ aŭ „sekretarion“. Kelkfoje estas dancado, sed kutime nur dimanĉon. Mallonge dirite modesta knabineto. Estis ŝi bona mas-trineto. Dio scias, al mi ŝi ekplaĉis kaj mi ne povis forgesi. Do mi edziĝis.

Ŝi venis en majo en mian forlasitan stacion. Subite ŝanĝiĝis ĉi tiu je ia elsorĉita angulo. Ĉio reviviĝis. Ne pro tio, ke estis majo, sed ĉar mi havis ĉe mia flanko bonan, junan edzinon. En la unuaj semajnoj ni kolektadis lekantojn kaj naive ni demandadis la blankajn petolojn: „Ĉu vi min amas, elkore, dolore, sekrete, iom aŭ ĉu neniom?“ Tenante nin je manoj ni ekbalancis ilin kaj ni kantis kune: „Tra verda herbejo akvo fluas“. Ofte mi rememoras, vespere ni eksidis sur benkon, kaptadis al si la manojn kaj batis sur ilin. Ĉiufoje ŝi ĝoje ekkriis, kiam mi ŝin ekbatis kaj poste ni ridis kune. — „Cip, cip, cipuŝki“ mi aŭdas ankoraŭ nune. — Tio pasis kaj ne revenos plu.

Kaj ĉe ŝi rapide pasis ĉi tiu poezio de la vivo. Jam komence de junio ŝi pendiĝis sur mian kolon kaj diris, ke ni povus havi du porketojn.

Porketojn? — mi ekmiris.

Nu jes. Nun ili estas ankoraŭ multekostaj, sed almenaŭ unu. Vintre ni havos kolbasojn.

Kolbasojn — mi pensis — sed poste ni ne plu kolektos lekantojn, eĉ la manojn ni ne plu karesbatos.

— Ankaŭ ŝinkon.

Pri kio ŝi revas? Kolbasoj, ŝinko. Kaj mi ne plu ludos „cipcipuŝki“ — mi meditis. Sed subite mi ekhontis antaŭ mi mem. Mi viro, kaj tia naiveco. Nu bone, — mi diris.

Post nelonge aperis du blankaj porketoj. Estas tute bela besteto — la porko. Rozkolora rostreto, pendantaj oreloj, suprenigita kunvolvita vesteto,

tute blanka. Kiel ĝi kuradas tien kaj reen kvazaŭ blinda. Oni ekkrias „maŝura, maŝura“, ĝi jam alkuras. Bona besteto. Kaj ni havos kolbasojn kaj ankaŭ ŝinkon. Utila besteto. Mi kontentiĝis. Kune kun la edzino ni iradis ilin manĝigi kaj karesgrafi.

En julio, jam sen demando, la edzino surprizis min, ke ni havas kvin kokinojn kaj virkokon.

Kokineto estas tre utila — ŝi komecis.

Nu, bone.

Kaj ĉu vi scias kiel oni vokas kokinojn?

Ne.

Ŝi instruis min.

Trian monaton venis anseroj, poste anasoj kaj denove sen permeso. Mi diris nenion, sed tio min maltrankviligis. Kion ĉion ankoraŭ la edzino kun-kolektos? Sur la korto ni eĉ ne povos iri. — Mi pli preferus ion en la ĉambro: belan inkujon, tapiŝojn. Aŭ, kiel taŭgus ekzemple kelkaj kaliketoj por junipera brando. Se iu venas, oni ne scias kion prezenti al li, oni hontas. El botelo oni ja ne povas trinki. Kaj jen — nuraj anseroj. Ili nur superflue blekas kaj maltrankviligas vin.

Sed mi diris nenion.

En septembro foje mi sidas sub fenestro. Subite mi ekaŭdas tintadon kaj kaprinblekadon. Kontraŭ min iras kaprino, abomena kaprino kun barbo kaj mallonga vosto. Sur kolo ĝi havas helan rubandon kaj sur la rubando sonrileton.

Kies estas tiu kaprino? mi demandis la edzinon.

Nia. Oni bezonas ĉiumatene lakton. Bovino estas multekosta.

Tion vi aĉetis? — Mi.

Mi eksaltis, por forpeli ien tiun antipatian beston, sed mi reĝis min, kaj por ke mi ne eksplodu de kolero, mi foriris en arbaron. — Tio estas jam multo. Tuta menaĝerio. Kaj mi tiam famen devis tiun kaprion strangoli; ĝi estas la kaŭzo, ke nun ĉi tie mi sidas. Mi ne faris tion. Ej, domaĝe. Sed mi imagis, ke kaprino sufiĉos. Ni havas el ĉiu bestospeco, venos ankaŭ viĉo je tapiŝoj kaj ankaŭ je bela inkujo.

En unu pluva posttagmezo la edzino same tiel, kiel ĉe la porkoj, pendiĝis

sur mian kolon kaj flustris:

Aŭskultu, ni havigu al ni kateton.

Ah, prefere jam hundon — mi diris tute bonintence.

Ĝi estas tiel ĉarma besteto. — Sed falsa.

Kaptas musojn. — Miaŭas.

Sed ankaŭ grumblas. — Gratias.

Do vi ne volas? — Ne, prefere hundon.

Eh, nur hundo.

Ŝi svingis per la mano, kvazaŭ hundo estus la plej mizera besto. Tio min kolerigis.

Nu, sciu, katinon mi ne permesos — mi diris decide, kaj mi iris al la pordo.

Vi estas antipatia!

Ne — Vi kun via katino!

La edzino elprenis tuketon kaj komencis ploreti. Tio min eĉ pli incitis. Mi ekridis kolere kaj frapinte per la pordo, mi eliris eksteren.

Mi havis emon reveni kaj diri al ŝi ion malmildan, por ke malpeziĝu mia koro, sed mi ekvidis malfermitan fenestrokovrilon, tiun mi kaptis kaj bategis ĝin kontraŭ la muron. Ĝi tre ekbruis kaj unu vitro en la fenestro dispeciĝis. Mi mem terurigiĝis, sed mi iris nur pluen. La longe ne sentita maldolĉa sento enpenetris en mian animon. Malsaĝulino, pro katino ŝi ploras. Eta pluvo ŝprucis en mian vizaĝon. Cindrokoloraj nuboj ruliĝis super la arbaroj; sur nigraj malsekaj plugitaĵoj kuŝis nebulo.

Korto estis plena de malseka, flava, defalinta foliaro de robinioj...

Tio estus bonega, se ŝi tiamaniere ĉiutage elpensus ian nebezonan beston. Kanariojn ni ankoraŭ ne havas, nek pigojn kun altonditajflugiloj. Turdon ni ankaŭ bezonus, ĝi fajtas. Kuniklojn al la kaprineto... Mi devas ŝin dekufimigi. Kaj ĉi tiu pluvo ne volas ĉesi. Tuta vivo estas abomena, eĉ sen aparta ĉagreno. Mem ĉi tiu vetero verŝas al vi ian melankolion en la animon. Tiel malgaje estas al vi, ke vi forirus ien malproksimen, kie suno brilas kaj floras arboj. Kaj venas al vi rememoro je somero, varma, dolĉa rememoro, kaj malgaje estas al vi, malgaje.

Mi iris denove en la arbaron. La nebulo ĉirkaŭis min, tiel ke mi ne sciis, ĉu ankoraŭ tiu eta pluvo aŭ ĉu la

nebulo mem malsekiĝas al mi la vizaĝon. Arboj estis jam tute nudaj kaj sur iliaj branĉetoj brilis milionoj da gutoj. Ekblovigis vento kaj ili defalis kvazaŭ nova fluo da pluvo. Piedoj glitis sur malseka tero. Malbone estas en la arbaro dum tia vetero. Mi turniĝis al la hejmo kaj pripensis, kiel mi alproksimiĝos al la edzino kaj kion mi diros al ŝi? La kolero pasis kaj ĉagrenis min, kio okazis. Mi pripensis, ke ŝi estas tamen nur virino. Saĝo eĉ ŝi malproksime. Estaĵo de la sento. Al ŝi diktas la koro, humoro. Kaj fine, katino ja eĉ ne estas tiel stulta. Ĝi kaptas musojn. Oni karesos ĝin, ĝi ekgrumblos. Ĝi frotiĝas je vi, lavas sin per piedeto. Kaj eĉ, se ĝi estas malgranda! Mi pardonpetos la edzinon kaj punkto. Mi permesos kaj fino.

Mi plirapidigis paŝojn kaj post duonhoron mi legis leteron, en kiu la edzino sciigis al mi, ke ŝi foriris al la ĝepatroj — pro mia konduto al ŝi.

Mi ĉifis la leteron kaj ĵetis ĝin en angulon.

Do spito. Kiu serĉus tion ĉe ŝi? Sed bone. Spiti scipovas ankaŭ mi kaj mi montrus, kiu triumfos. Katinon mi ne permesos, ne kaj ne. Sidu ŝi hejme. Decidita mi komencis labori. Ĉe vespermanĝo, mi devas almenaŭ nun konfesi, la edzino iom mankis al mi, sed mi kuiris mian vespermanĝon mem. Tri ovojn kaj sufiĉe. Dum nokto mi dormis bonege. Matene mi vestis min, ekfumigis pipon kaj iris eksteren. Pluvo ne ĉesis. Porkoj kvikis. Anserkriado, kokokriado estis aŭdeblaj de la korto. Vi ne koncernas min! Prizorgu vin kiu ajn. Mi revenis en la ĉamboron. Mi rigardas, kie estas mia matenmanĝo kaj mi maltrankviliĝis. Do mi mem devos iri melki la kaprinon, se mi volas manĝi. Nu, kaj kial ne? Mi prenis melkujon kaj benketon kaj eniris en la stalon.

Lizo, Linjo, vi devas doni al mi lakton, mi alparolas ĝin.

Lizo rigardis flanken kaj kvazaŭ ŝi estus ekridinta. Mi eksidis sur la benketon, metis la melkujon inter la piedojn kaj mi volas lavi. Lizo timigita forsaltis de mi.

Nu ne timu, ne timu — mi kvietigis ĝin.

Sed Lizon neeble frankviligi. Ĝi saltadis kiel freneza, batis per piedoj, per kapo ĝi iris kontraŭ min. Dekfoje mi komencis melki, dekfoje sen rezulto. Kaj la edzino ĝin ja ĉiumatene melkis, ĉar mi matenmanĝis ĉiutage lakton. Kial tio? Ĉu nur pro tio, ke mi estas viro kaj hontemo ne permesas al ĝi aŭ ĉu ĝi scias, ke mi malpaciĝis kun la edzino kaj ili interkonsentis, ke ili venĝos sin je mi? Mi ne povis tion kompreni. Mi ekprovis la dekunuajn fojon. Mi kapfis ĝin je vosto, altiris al mi, sed vane, vane. Mia edzino triumfos super mi, kiam ŝi ekscios. Subite venis al mi ideo. Eble tiel mi sukcesos.

Mi eliris el la stalo, fermis la pordon kaj survestis ruĝan jupon de la edzino. Poste mi metis ŝian bluan tukon sur la kapon, ree eniris en la stalon kaj ek-sidas al Lizo. Kaj jen! Lizo estas frankvila.

Mi ektiras foje, dufoje — Lizo frankvila. Mi melkas — Lizo frankvila.

Tamen vi ne triumfos, edzino mia! Kaj mi melkas, beleĝe mi melkas kaj Lizo ne moviĝas.

Mi ja tamen matenmanĝos.

Subite mi ekaŭdis fajfon. Ĝi estas matena persona vagonaro. Mi eksaltas rapidege kaj kureĝas kun la melkujo en la stacion. La vagonaro enveturis kaj ekhaltis. Konduktoro ridas, poŝtisto en fenestro ridas kaj ĉiuj pasaĝeroj rigardas min. Unu ĝendarmo desaltis kaj iras rekte al mi. Kio okazis? Mi rigardas malantaŭen, poste sur min mem... Pro Kristo! La jupo kaj la tuko de la edzino...

Oni forveturigis min en frenezulejon. La edzino tamen triumfos!

El la slovaka trad. P. ROSA (Bratislava).

JARMILA HAŠKOVÁ:

JEN LA HOMO!

La vagonon eniris patrino kun granda bela knabino. La zorgokonsumita, maldika, pala patrino pene portas valizon. La knabino, kvankam sanega, iras kun manoj malplenaj, malvigle ŝanceliĝas kaj eksidas sur la unuan neokupitan lokon.

„Karulino,“ ne tien. Venu ĉi tien, al la fenestro!”

La knabino sulkiĝas la frunton kaj sidas. La patrino demetas la valizon, iras al la knabino, delikate prenas ŝian manon por veniĝin ŝin al la fenestro. La knabino obstine skuas la kapon kaj kuŝiĝas sur la benkon.

Ekstere, sub la fenestro de la vagono, staras maljuna sinjorino. Ŝi vokas al la pala patrino:

„Ĉu Milonjo sidas bone? Ŝi rigardu min ankoraŭ unufoje!”

„Milonjo, karulino, rigardu tra la fenestro kaj ridetu iomete al la avino. La avineto volas vin vidi.”

„Ne,“ respondas la knabino obstine.

„Nu, Milonjo, ekrigardu tra la fenestro, la avino ĝojos, ekrigardu.”

„Ne,“ ekkrias la knabino kolere.

La patrino kliniĝas tra la fenestro: „Ŝi ne volas. Mi diras al ŝi, ŝi ekrigardu, sed ŝi ne volas.”

La maljuna sinjorino subite esploras sub la fenestro: „Ŝi ekrigardu min, ŝi almenaŭ venu al la fenestro, mi volas ŝin ankoraŭ vidi.”

La patrino denove sin furnas en la vagonon al la knabino, karesas ŝian hararon kaj delikate riproĉetas: „Nu, Milonjo, rigardu la avineton, ŝi ploras. Rigardu la avineton kaj mi ion donos al vi.”

La knabino skuas la piedojn, etendas sin sur la benko kaj neas per la kapo: „Tute ne, mi ne volas.”

Kaj estere larmante vokas la avino: „Milonjo, Milonjo!”

Nia pacienco estas ekscitita, dume la patrino karesas la hararon de la knabino kaj delikate ŝin petas.

„Estus bele, ke tia granda knabino tiel konduitu!” Maljuna sinjoro leviĝis de sur la benko kaj iras al la knabino.

La patrino rapide turniĝis. Ŝi rigardas min per malgajaj, timemaj okuloj kaj diras subite: „Mi petas vin, sinjoro, lasu ŝin, ŝi estas malsana. Mi veturigas ŝin en frenezulejon...”

El la ĉeĥa trad. Fr. KRUTÁK.

MIAJ IMPRESOJ DE LA KONGRESO EN PARIZO.

Mi ŝatus priskribi ilin tre detale — ili certe estus interesaj — tamen mi devas kiel ankaŭ volas limigi min nur je la ĉefaj trajtoj. Devas — por ke mia rakontado ne fariĝu tro longa, volas — ĉar certajn impresojn oni ŝatas gardi nur por si mem, eĉ se ili ne estas sekreto.

Mi venis en Parizon la unuan fojon, tamen ĝi ne estis al mi nekonata. De multaj francaj prelegoj, de multaj libroj kaj ĵurnaloj mi detale konis Parizon kaj ĝian historion jam de longe. Mi konis sufiĉe bone la planon de Parizo kaj mi kapablis mense fari diversajn promenadojn tra la centro de tiu ĉi „mondo“. Ĉar Parizo ne estas urbo, ĝi estas mondo. Pro tio mi trovis tute nature, ke forlasinte la okcidentan stacidomon (Gare de l'Est) post nia alveno, por atingi nian hotelon mi devis trapasi la bulvardon de Strasbourg, bulvardon de Sébastopol, preferpasi la juĝistan palacon kun la fama „Conciergerie“, malliberejo de la reĝino Marie Antoinette ktp. Ĝis la bulvarde de Sta Mikaelo, per kiu komencas la Latina kvartalo (Quartier Latin), kie troviĝis nia kongresa sidejo Ni turnis nin maldekstren en la Straton de la lernejoj (Rue de Écoles) kun la fama universitato Sorbonne dekstre kaj jen, nia hotelo, Grande Hotel de France et d'Orient. Post la necesaj formalajoj mi supreniris mian ĉambron kaj kiam mi malfermis ĝian fenestron aperis antaŭ mi — tute proksime — la ambaŭ turoj de la preĝejo Notre Dame (Nia sinjorino) bele lumigitaj de la posttagmeza suno. Mi rigardis longe... kaj mi faris tion ĉiam, kiam mi revenis mian ĉambron kaj ofte, precipe nokte, kiam mi vidis nur la siluetojn de la turoj, mi pensis pri la stranga kaj mistera figuro de Quasimodo, kies eldorado la ambaŭ turoj ja estis.

Post nelonge mi estis jam survoje al la kongresejo. Ni malsupreniris la duan straton maldekstre de nia hotelo kaj haltis ĉe la angulo de bulvarde de Sta Germain, ĉar jen — antaŭ ni aperis grandega kvinpinfa verda stelo kun la emblemo de Parizo en la mezo kaj kun surskribo anoncanta la okazontan kongreson — la kongresejo. Ĉiuj enirejoj estis jam malfermitaj, oni vidis jam vigan trafikon — la kongresa vivo komencis. Kia bela momento! Subite mi ne sufiĉe rapide kapablis frakuri tiujn eble 50 paŝojn, kiuj dividis min ankoraŭ de la kongresejo kaj eniris ĝoje kaj esperplene.

Baldaŭ sonis tra la tuta kongresejo ĝenerala salutado kaj bonvenado, ĉar ĉiam oni trafis

kaj renkontis novajn amikojn. En la kongresoficejo, en diversaj salonoj, ĉe la poŝtoficejo, informejo, librovendejo, en la haloj, sur la ŝtuparoj, en la babilejo, en la bufedo, ĉie estis jam plena vivo.

Ĝis la komenco de la interkonatiĝa vespero estis ankoraŭ sufiĉe da tempo, tial mi kun mia itala amiko volonte akceptis la inviton de mia franca konatulo, konduki nin tra interesa parto de Parizo. Kaj efektive, ni ne bedaŭris. Mia franca amiko montris al ni la plej malnovan, tre pitoreskan parton de Parizo, apud la rivero Seine. Oni malsupreniras tien per ŝtuparo kaj oni vidas tie tute malnovajn dometojn kun strangaj fasadoj, strangaj enirejoj, stranga ĉirkaŭaĵo. Malgrandaj kaj mallargaj stratetoj, ie malgranda placo, kie la infanoj ludas, tute frankvile, ĉar nenia tramo, nenia aŭtomobilo aŭ alia veturilo ĝenas ilin. La maljunaj sidas antaŭ la domoj, observas nin kaj babilas inter si en sia stranga jargono. Oni havas impreson esti ne en centro de Parizo, sed en ia pure provinca urbeto.

La horo por komenci la interkonatiĝan vesperon jam pasis, sed amaso da kongresanoj atendis en la haloj. Nenio moviĝis, pasis jam pli ol unu horo kaj oni ankoraŭ atendis. Mi estis iomete seniluziigita kaj post kiam ni eksciis, ke krom ke oni supre en unu salono povas danci, efektive nenio alia okazas, ni estis malagrable surprizitaj. Estis iomete tro primitiva por Parizo, despli, ĉar bona aranĝo de interkonatiĝa vespero estas grava kaj en certa rilato dependas de ĝi ankaŭ la sukceso de la tuta kongreso. Sed ni neniel malbonhumiĝis, ĉar ni neniam forĝesis ke ni estas ja — en Parizo! Se mankas amuzo je unu flanko, oni certe ĝin trovos je la alia kaj pro tio ni tute senbrue forlasis la kongresejon kaj faris dum preskaŭ du horoj noktan vojaĝon aŭtomobile tra Parizo.

Venontan matenon la solena malfermo de la kongreso — en la fama Sorbonne. Jam pro tio la malfermo estus devinta okazi multe pli solene ol ĉe ĉiuj aliaj kongresoj. Bedaŭrinde tre malmultaj ĉeestantoj estis konsciaj pri tio, multaj kondukis tre neinde. La granda amfiteatro kun la statuoj de Richelieu, Sorbon, Rollin, Lavoisier kaj Descartes komencis pleniĝi en la lasta momento kaj tiel okazis, ke kiam dum la eniro de la ŝtata reprezentanto la ĉeestinta militista muzikistaro ekludis la francan himnon, la malfrue alvenintaj tute ne atentis kaj senĝene daŭrigis serĉi lokon, ĝenante ne nur la frue alvenintajn, sed ankaŭ la ĝeneralan aspekton de la komenco. Kaj neniam ekregis silento, kontraŭe, la bruo fariĝis ankoraŭ pli granda, kiam la u-

nuopaj delegitoj salutis la kongreson kaj kiam la ĉeestantoj post ĉiu momento aplaudis. La parolintoj estis interrompataj per tia sensenca aplaudado, oni multon ne komprenis kaj perdis vane la tempon. Kelkajn momentojn mi eĉ pensis: Ĉu venis eble tiun fojon publiko malpli edukita? — Mi ne kredas — nur en la pariza atmosfero la diversaj mankoj de edukiteco fariĝis pli evidentaj.

La kongreson malfermis per simpatia maniero la prezidanto de LKK sro Georges Warnier, salutante la ĉeestantajn aŭtoritatojn, en la unua vico la reprezentanton de la prezidanto de la respubliko, menciinte, ke la mortinta prezidanto, Paul Doumer, per propramane skribita letero promesis sian personan ĉeeston. Bedaŭrinde, okazis alie — kaj oni malĝoje honorigis la memoron de la mortinto per leviĝo. Poste sro Warnier tre kore salutis kaj bonvenigis nin. Daŭrigis saluti la aŭtoritatojn, post ili la unuopaj delegitoj. Estis domaĝe, ke oni ne salutis laŭ la ĝisnuna tre bela kaj impresa kutimo — nome antaŭe en la nacia lingvo kaj poste en esperanto. Anstataŭ tio kelkaj delegitoj penis diri sian saluton per tro longa, ofte sensignifa parolado, kvankam oni petis paroli nur 3 minutojn.

Je tagmezo la solena malfermo de la kongreso finiĝis kaj ni forlasis la Sorbonne... Ĉu ni revenos ankoraŭ foje tien? Kiam — kaj dum kiaj cirkonstancoj?...

Ĉe la proksimaj ruinoj de malnova Parizo — Arène de Lutèce — (Lutèce, malnova nomo de Parizo) okazis komuna fotografado. La ĝigantan bildon de la kongresamano oni povis jam la venontan tagon vidi en la kongresejo.

Posttagmeze je la 15a okazis solena malfermo de la somera universitato kun parolado kaj sub prezido de prof. Odo Bujwid kaj kun la unua interesa prelego de sro Georges Avril pri „Evoluo de l'Kinema arto“ kun montrado de filmoj plej unuaj kaj plej modernaj.

La vesperon mi pasigis kun miaj amikoj, amuzis bonege, sed detaloj estus tro multaj kaj nur pure personaj.

Lunde je la 9.30 okazis la unua laborkunsido prezidata de sro John Merchant, al kiu altiris min speciale la parolado de Dro Olšvanger: „Pri arto individua kaj kolektiva“. Dro Olšvanger ne nur estas mirinda oratoro, sed ankaŭ la enhavo de liaj paroladoj estas ĉiam profunda kaj serioza. Mi havis okazon kelkfoje kun li paroli kaj konversacii — li ankaŭ donacis al mi libreton de siaj belaj, profundaj poemoj. Kiu ne aŭdis lian paroladon, povas bedaŭri.

Je la 12.30 ni estis invititaj je lunĉo ĉe la granda magazeno „Galerie Lafayette“. La lunĉo

okazis sur la vasta tegmento de la domo Lafayette, de kie oni vidis malproksimen; ni vidis bonege la monteton Montmartre kun la preĝejo Sankta Koro (Sacré Coeur). Post la lunĉo oni promenadis sur la tegmento, vizitadis sin reciproke, fotografadis. Intereson vekis en la mezo de la tegmento starigita modelo de aviadilo kiu alteriĝis sur tiu ĉi loko. Post la lunĉo oni vizitis, etaĝon post etaĝo la grandan magazemon mem.

Posttagmeze estis aliaj prelegoj de la somera universitato: de sro André Baudet: „La komerco antaŭ cent jaroj — nun — post cent jaroj“ kaj de sro Gaston Waringhien: „La moderna franca literaturo“, ambaŭ tre interesaj.

Vespere ne estis oficiala programo, sed okazis komuna vespermanĝo aranĝita de la parizaj grupoj en restoracio en bulvarado de la Chapelle 124. Oni invitis nin tre kore, ni do decidis iri kaj antaŭpagis la unuecan prezon de 10 frankoj. Komence nin amuzis la ĥaoso, kiu regis tie, ĉar oni ne estis preparitaj por tia nombro, sed fine, kiam ni jam pli ol unu horon vane atendis kaj urĝigis nian vespermanĝon kaj kiam ni finfine devis kontentiĝi ne nur per duona manĝo, sed eĉ per restaĵoj, mi ĵuris solene, ke neniam mi partoprenos ion similan, pagante antaŭe, ĉar tio, kion ni manĝis, resp. ricevis, ne valoris eĉ 2 frankojn. Sed valoras la nova sperto.

Pri la malbona impresio ni entute forgesis dum la nokta promenado tra Montmartre (pariza boema kvartalo), kiu okazis post la vespermanĝo. Gvidis nin ĝrizhara pariza samideano, kiu vere bone sciis nin amuzi. Bedaŭrinde mi ne rememoras lian nomon, tamen volonte mi rememoras lin, lian gajecon kaj spritecon. Estis jam malfrue, sed kantante kaj ridante, ni faris tian bruon, ke ni vekis la dormantan loĝantaron. Oni rigardis el la fenestroj, sed vidante nian ĝajan mienon, oni ne grumblis, sed ridis ankaŭ kaj salutis nin. Ni trairis grandan parton de Montmartre, la mallarĝajn stratojn supren kaj denove malsupren irantajn, ni vidis la strangajn kunvenejojn de la parizaj boemoj kaj aŭskultis la strangajn rakontojn pri la vivo en Montmartre. Sed kiel mi poste konvinkiĝis, la iama poezio de Montmartre jam delonge pasis... Hodiaŭ multo estas artefarita por amuzo de la fremduloj kaj nur ĉe, en ia forgesita strateto, troviĝas ankoraŭ simpla domego, en kiu neniuj serĉus kafejon aŭ vinejon, vera kunveno de artistoj kaj boemoj.

Malbela kaj neinda estis la senĉesa kantado de la himno. Ĉu oni iam forlasos tiun ĉi malbonan kutimon? (Daŭriĝo.) A. Tarantíková.

VUK ECHTNER:

ESPERANTO KAJ BLINDULOJ.

Eble en neniu alia fako Esperanto servas tiel efike kaj estas tiom disvastigita kaj uzata, kiel inter la blinduloj. Tiu ĉi fakto estas ĝenerale konata; artikoloj, raportoj kaj mencioj pri tio aperas sufiĉe ofte, kaj niaj kongrespartoprenantoj ne preferatentas, ke samtempe kaj samloke kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto okazas (de post 1921) ĉiujare Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj. Kaj tamen, malgraŭ tio, ke ĉio ĉi estas bone konata, ke ĝi apartenas jam al aferoj kurantaj, nenovaj, oni ĉiam ankoraŭ trovas paciencajn aŭskultantojn por tiu ĉi temo, kaj ne malofte aŭdas eĉ de spertaj, malnovaj esperantistoj la miran demandon: „Kion komunan povas havi la blinduloj kun Esperanto?“

Koncize, sed laŭeble plene respondi tiun ĉi demandon estas la intenco de tiu ĉi artikolo.

*

Kiel aŭtoro de la ideo enkonduki Esperanton inter blindulojn, estas konsiderata †Profesoro Théophile Cart. Dum la Unua Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazinta 1921 en Praha, li rakontis, kiel li trovis tiun ĉi ideon:

Antaŭ 1904 lia filo (batalmortinta dum la mondmilito) suferis tiom gravan okulmalsanon, ke blindiĝo estis minacanta dum kelka tempo. En tiu tempo de necerteco kaj prema zorgo pri la sorto de amata infano, la praktika patro ne konfuziĝis, sed ekinteresiĝis pri blindula vivo kaj sendube pri tio, kiel estus eble plifaciligi, lumigi tiun fatalon sorton, se ĝi trafus ankaŭ la karan filon. Feliĉe la malsano forpasis sen postsignoj, sed li patro, en tiu tempo june entuziasma pri la nova lingvo kaj ĝia idealo, ne forlasis la penson, ke lernado de Esperanto, ĝia kulturado, ĝiaj riĉeco kaj beleco, la noveco de la ideo pri internaciaj frateco kaj kunlaborado por komuna utilo, prezentas por la unutona, malplena vivo de blindulo ne nur traŭgan kaj noblan distron, sed eĉ unikan kompletigon de rimedoj por la tiam nove komenciĝantaj internaciaj rilatoj en la blindulzorga movado. Tiujn ĉi rilatojn ebligis ĉefe la eltrovo kaj ĝenerala, tutmonda enkonduko de la reliefpunkta skribsistemo de Braille, kaj Cart ĝuste konkludis, ke Esperanto povus fariĝi — pro la specialaj kondiĉoj en la blindulfero — faktoro senkompare efika en tiuj ĉi modernaj klopodoj.

La ideo ne devis resti nur ideo, Prof. Cart eklaboris. Li alvokis diverslandajn samideanojn,

invitante al kunlaboro, kaj korespondis kun blindulinstitutoj kaj famaj blindulpedagogoj. El tiu tempo datas ankaŭ lia konata pefskribo al registroj. Kiom multe fidis la aŭtoro bonan rezulton el sia entrepreno, tiom pli bonkore li ridetis, raportante pri ĝi: „Nur du reĝinoj respondis. Unu sendis monsumeton tute nereĝan, la alia promesis helpon.“ La promeso pri helpo montriĝis pli valora, ĉar ĝin faris kaj post kelka tempo plenumis la rumana reĝino poetino Carmen Sylva, kiu enkondukis devigan instruadon de Esperanto en la blindulfernejo de Bukaresti.

Ĉefaj esperantistoj atentigis pri la klopodoj de la pariza universitata profesoro la faman blindan muzikkomponiston ĉefan †Karel Emanuel Macan, la tiaman pedagogian direktorom de la Blindulinstituto de Klár en Praha. Tio okazis en la jaro 1904, de kiu datas la movado inter nialandaj blinduloj ĉefaj kaj germanaj. En la sama jaro Prof. Cart fondis blindulpresan Esperantogazeton en Parizo, „Esperanta Ligilo“.

Subtenata de kelkaj vidantaj amikoj, la eminenta ĉefa blindulo ekriĵatis kun Cart kaj ekstudis la lingvon. Pri tio rakontis Majstro Macan al mi, ke li ne tre volonte cedis al la persvadoj de amikoj kaj kun ne tre granda fido pri sukceso enkondukis instruadon de Esperanto pro ve por unu jaro en la instruplanon de sia lernejo. — La provjaro feliĉe alportis gravan ŝanĝon. Al ĝi kaj al la fervoro de Macan ni dankas la nunan brilan ŝtaton de la blindul-esperantista movado en nia lando. Dum tiu ĉi jaro Majstro Macan konvertiĝis plene kaj daŭrigis sian senlaca laboron por Esperanto inter blinduloj ĝis sia bedaŭrinda morto (1925).

Nur la mondmilito ĉesigis por kelka tempo la instruadon de Esperanto en la Instituto de Klár. Kaj la milito kaŭzis ĝian novan enkondukon: Majstro Macan instruis Esperanton al soldatoj blindigitaj en la milito, kiel unu el la rimedoj kapablaj redoni al la senkuraĝuloj kaj malesperantoj novajn vivintereson kaj vivĝojon. De tiam la instruado en tiu ĉi instituto okazas regule ĉiujare.

La mondmilito kun siaj viktimoj tiamaniere kaŭzis konsiderindan plivastigon de la laborkampoj, kaj tio postulis kaj inventis novan energion. Unu el la pozitivaj rezultoj estis la fondo de la Ĉefa Blindulpresa Societo (Spolek Český Slepecký Tisk). Ankoraŭ dum la milito aperis ĝia unua eldonaĵo, libro titolita „Jitřenka“ (Aŭroro), kiu interalie enhavas mallongan Esperantokurson el la plumo de †Profesoro Stanislav Stejskal, kiu tiutempe fariĝis tre aktiva

kunlaboranto de Macan kaj grave influis lian poresperantan agadon, precipe el vidpunkto organiza. En 1920 estis fondita ĉe la ĉefa blindulorgano „Zora“ monata aldono „Aŭroro“ en-kaj priesperanta. Kvar jarojn daŭris tiu ĉi komuna aperado; en 1924 „Aŭroro“ fariĝis memstara gazeto. Ĝis hodiaŭ ĝi aperas nepre regule. En la daŭro de tempo ĝia enhavo, amplekso kaj aperofteco perfektigadis kaj la eldonnombro kreskis. Nuntempe ĝi aperas kvinfoje jare; el 40 paĝoj en la komenco ĝi evoluis al 80 paĝoj nur en Esperanto plus 20 paĝoj da lingvoinstrua aldono por ĉeĥoslovakoj.

La amika kunlaborado de Macan kaj Stejskal kaj ilia influo en la blindulzorga movado en ĈSR kaj eksterlande portis bonajn fruktojn. Unu el la plej bonaj estas la okazigo de la Unua Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Praha, 1921. Ĝin efektive partoprenis la unuan fojon oficiale reprezentantoj de la blindula movado el multaj landoj, inter ili Cart mem. La unua kongreso montris la vojon al dekonu pluaj, regule ĉiujaraj, okazantaj ĝis nun ĉiam apud la Universalaj Kongresoj de Esperanto (la lasta 1952 en Parizo). Ili estas la solaj internaciaj kongresoj de blinduloj ĝenerale. En ili partoprenas aktivuloj el la tutmonda blindulzorga movado, diskutas, interŝanĝas, ekspluatas kaj kolektas en ili spertojn pri sia laboro por la ĝenerala pliboniĝo kaj plifaciligado de la blindula vivo per instruado aŭ socialaj aranĝoj k. s. Tiun ĉi laboron organizas UABO, la Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj, la iama Universalasocio de Blindaj Esperantistoj. UABO per Esperanto kaj per sia kelkjara sperto kiel la sola internacia organizo blindula mantenas la gvidon de la tutmonda blindulzorga, memhelpa movado. Ĝia oficiala organo estas la sola internacia blindulrevuo brajlpresita (reliefpunkte), la Universalasocio por Blinduloj, konata sub la nomo „Esperanta Ligilo“, redaktata ekskluzive en Esperanto de Harald Thilander en Svedujo, blinda, surda kaj kripla, sed tre inteligenta, eminenta redaktoro de ok diverslingvaj brajlpresitaj gazetoj.

En pluraj landoj fondiĝis landaj aŭ naciaj societoj de blindaj esperantistoj. El ili menciindaj estas SOCNE, la nialanda Societo de Ĉs. Nevidantaj Esperantistoj en Praha, la „Balkana Stelo“ en Bulgarujo, la finnlanda societo, la Franca Asocio de Blindaj Esperantistoj, la Esperanto-Blindulligo de Germanujo, la Blindul-Esperantista Ligo de la Hungara Reĝlando. En kelkaj aliaj landoj la vigla movado ne estas jam organizita, ekz. en Japanujo, Nederlando k. a.

SOCNE organizas nialandajn blindajn esperan-

tistojn sen diferenco pri nacio, religio, politiko k. t. p. Ĝi estas fondita en la jaro 1922 kaj havas nun 64 blindajn membrojn. Interalie ĝi prizorgas la instruadon de Esperanto al blinduloj. En la lastaj jaroj la lingvo estas enkondukita kiel deviga fako en la blindullemejoj en Praha (institutoj Hradčany kaj Deyl); krome okazas oficiala instruado en vesperaj kursoj (Deyl kaj Klár), kio signifas, ke la aliĝo al tiuj ĉi kursoj estas memvola, sed la aliĝinto devas finviziti la tutan kurson. En la lerneja jaro 1931—1932 absolvis 78 blindaj infanoj kaj junuloj Esperantoinstruadon.

Inter ne-institutanoj disvastiĝas Esperanton la ĉs. blindulorgano „Zora“, kiu la duan fojon aperigas regulajn esperantajn aldonojn okpaĝajn, de post 1929. Ĝis nun aperis kiel ĝia eldono kompleta skriba kurso de Esperanto, kiun nun sekvas, kiel ĝia komplemento, laŭeble detala esperanta-ĉeĥa vortaro.

La gazeto „Aŭroro“ atingis en 1932 sian 13an jaron kaj estas do unu el niaj malnovaj kaj plej regulaj gazetoj nun aperantaj. Fondita de Macan en 1920 kaj redaktita de li ĝis lia morto en 1925, ĝi estis redaktata de prof. Stejskal ĝis ties morto en 1929. Nun ĝi estas redaktata de la aŭtoro de tiu ĉi artikolo; la menciita skriba kurso en „Zora“ kaj la nun aperanta vortaro devenas el la sama plumo. Ni menci ankaŭ la fondon de la Biblioteko de „Aŭroro“ kaj el ĝiaj ĝisnunaj eldonaĵoj (brajlpresaj) la lernolibron de Julie Supichová (aprobita de la ministerio), la vortaron de Procházka-Kühnl, la Frazologio de Riedl, Memorlibron pri Macan kaj kolekton de ĉeĥaj naciaj kantoj en Esperanto, tekstoj kaj melodioj.

En Praha krome funkciis dum la vivo tre aktiva de Prof. Stejskal la Internacia Blindula Informejo kaj Statistikejo, kies servojn (ebligatajn per E.) uzis eĉ niaj ministerioj. Bedaŭrinde, pro manko de oferemaj laborantoj la funkciado de tiu ĉi grava institucio preskaŭ plene haltas.

La bona ideo de Cart trovis sian efektivigon. Esperanto servas utile al la blinduloj. Ni aŭdu, kiel ili taksas ĝin. Jen la vortoj de eminenta blindulo, ĉeĥa muzikkomponisto kaj sperta pedagogo, Karel Emanuel Macan:

„La reliefpunkta skribsistemo de Braille kaj la internacia helplingvo Esperanto — jen du donacoj, plej valoraj el ĉiuj donitaj iam ajn al la blindularo. La unua ebligis la instruadon de blinduloj, la alia malfermis vojon al la mensoj kaj koroj de blinduloj tra la tuta mondo.“

Nová a přece již stará myšlenka.

(Spesmil — mezinárodní a esperantská měna.)

V anglickém parlamentě promluvil nedávno Winston Churchill o stabilisaci anglické měny a navrhl vládě, aby zavedla měnu esperantskou na podkladě stabilisovaného šterlinku. Jeho návrh vzbudil zájem, v kruzích finančních zvláště amerických, mezi nimiž Churchill svou myšlenku horlivě propaĝuje.

Jeho návrh zdá se být zcela novým řešením mezinárodního měnového chaosu, avšak jeho základní myšlenka není nic nového, neboť byla vyslovena již v roce 1906 a záhy na to došlo i k jejímu praktickému provádění, za války byla pohřbena, nikoliv však navždy, neboť začíná se o ní opět uvažovat.

Její tvůrcem jest švýcarský matematik, profesor dr. René de Saussure, horlivý propaĝátor esperanta. Přišel na ni při čtení esperantských časopisů, v nichž si všiml, že jejich předplatné a insertní poplatky, jakož i ceny zboží v nich inserovaného jsou udávány v různých národních měnách, jichž srovnatelnost vzhledem ke kolísajícím kursům působí i odborníkům určité obtíže. Jaké by to bylo zjednodušení, kdyby všechny tyto ceny místo ve francích, markách, dolarech, rublech, lírách, šilincích, korunách, pesetách, piastrech atd. byly udávány v jediné, mezinárodní měně. V obchodě vnitrozemském používalo by se dále příslušné měny národní, v obchodě mezinárodním platila by však jediná měna mezinárodní a ceny vyjádřené v této měně daly by se jednoduchým početním úkonem přepočítat na kteroukoliv měnu národní.

Jako mezinárodní minci navrhl prof. de Saussure peníz „Spesmil“, ražený z 8 gramů zlata ryzosti 11-12, jenž by se svou hodnotou rovnal 0.733 gramům ryzího zlata. Zlatý dvacetifrank měl té doby 5.8064, zlatá dvacetimarka 7.168 a zlatý pětídolar 7.523 gramů ryzího zlata, takže jeden Spesmil měl mít cenu 2.526 zlatého franku, 2.056 zlaté marky, 0.4875 zlatého dolaru.

Esperantské časopisy začaly Saussureovu myšlenku horlivě propaĝovat. O její praktické využití pokusil se německý velkopřemýšlník Herbert F. Höveler, jenž za tím účelem založil v Londýně roku 1907 banku „Čekbanko Esperantista“. Účelem této banky bylo zavádění esperantskou měnu a provádění platy v této měně. Měla celkem 1027 zákazníků ze 43 různých států. Mezi jejími zákazníky nebyly jen

esperantské spolky a nakladatelství, nýbrž i velké světové firmy, vykazující značné peněžní obraty, jako na př. Cookova cestovní kancelář a Washingtonská obchodní komora. Esperantská banka byla ve spojení s mnohými bankami zahraničními, zvláště německými a švýcarskými.

Pozoruhodnou bankovně-technickou novinkou byla Hövelerova esperantská mezinárodní šeková dopisnice. Tato dopisnice byla rozdělena na dva díly, z nichž pravý větší byl svou větší stranou určen pro adresu a vnitřní stranou pro odesílatelovo sdělení, levý menší díl byl šekem, jenž mohl být vystaven jedině na esperantskou měnu Spesmil.

Byl to zdařilý pokus o zjednodušení a zlevnění mezinárodních poukazů menších částek. Poštovní poukázka není totiž tak mezinárodní, jak se mnozí domnívají. Jsou i velké státy, jako na př. Španělsko, které jí neznají, v jiných pak státech (na př. ve Velké Británii, Švýcarech) jest peněžní poukázka došlá z ciziny přepisována na zvláštní formulář a příjemci nemůže být doručena, takže sdělení na ní napsané adresát vůbec nedostane. V některých státech jest výplata peněžních poukázek, zvláště pak cizích, spojena se značnými obtížemi.

Za své sedmileté praxe s propaĝací mezinárodní měny nasbíral Höveler cenné zkušenosti, jež vydal tiskem. Poukazuje zvláště na to, že národní měny nejsou navzájem v pevném poměru. Touto jich nestálostí může dojít i k zhroutilí některé z nich a k rozpadu mincovních uní (jako na př. skandinávská a latinské). Zavedení mezinárodní měny, existující současně vedle měn národních, dalo by se provést tak, že by se tato měna opřela o měnu některého hospodářsky zajištěného státu anebo, což Höveler pokládal za lepší, že by jejím základem byla hodnota chemicky čistého zlata nebo některého zboží po celém světě stejně cenného. Mezinárodní měna musila by ovšem být znamenána na všech světových peněžních bursách. Spesmil pokládal za nepraktický pro jeho značný obsah zlata.

Čekbanko Esperantista byla nucena svou činnost za války zastaviti a po válce, když Höveler zemřel, zlikvidovala. Tím skončil tento zajímavý pokus o vytvoření mezinárodní měny. Její myšlenka však nezašla. V kruzích národohospodářských a finančních se o ní stále uvažuje a Winston Churchill jest jedním z jejích nejnadšenějších propaĝátorů.

KELKAJ CIFEROJ
PRI LA V-a ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO
EN OLOMOUC.

Estis pagitaj 262 kongresaj kotizoj. De tiu ĉi cifero ni dealkulu 3 (2 eksterlandanoj, 1 loka societo) kaj ni ricevas kiel bazon por nia statistikado la ciferon 259, t. e. ducent kvindek naŭ ĉeĥoslovakaj kongresanoj, el kiuj

67 estas organizitaj en ĈAE	25.87%
31 estas organizitaj en GEL	11.97%
do 98 en nacia societo	37.84%
150 estas organizitaj en UEA	57.92%

Tio ne signifas, ke 95.76% de la kongresanoj estas organizitaj, ĉar el ili

nur 84 estas plene organizitaj 32.43%

(komprenu: ili estas membroj de ĈAE aŭ de GEL kaj de UEA)

89 estas duorganizitaj 30.89%

(2 nur en ĈAE kaj ne en UEA,
12 nur en GEL kaj ne en UEA,
66 nur en UEA kaj ne en ĈAE aŭ GEL)

95 restas tute neorganizitaj 36.68%

Por faciligi al ni la komprenon, ni uzu tute simplan manieron: En Olomouc el ĉiuj tri kongresanoj unu estis plene organizita, unu duone kaj unu restas neorganizita. Tia stato estas neniel kuraĝiga. Triono de la kongresanoj aŭdis pri niaj doloroj, klopodoj, planoj, ktp., ili povis diri siajn opiniojn, siajn plendojn, siajn deziraĵojn. Multfoje ni invitis la neorganizitan esperantistaron sen notinda sukceso. Ŝajnas al ni, ke multaj preferas resti ekster organizo, kio ja kostas nenion. Tamen kritiki la laboron de la aliaj kaj ataki la laborantajn membrojn de niaj organizaĵoj ili ŝatas — tio ja kostas ankaŭ nenion.

Interesa estas la grupigo de la kongresanoj laŭ iliaj lokoj, de kiuj ili venis:

53 el Olomouc,
29 el Brno,
26 el Praha,
16 el Přešov,
15 el Prostějov,
13 el Krňov,
7 el Bratislava,
10 po 5 el Český Těšín kaj Moravská Ostrava,
18 po 3 el Břeclav, Hradec Králové, Karvinná,
Liberec, Litomyšl, Nový Bohumín,

22 po 2 el Bakov nad Jizerou, Dubí, Kladno, Košice, Kunovice, Lednice, Litovel, Přelouč, Střeň, Těšetice, Uherské Hradiště,

50 po 1 el Bocoňovice, Brunzeř, Bzenec, Česká Kamenice, České Budějovice, Česká Třebová, Frývaldov, Hnidousy, Holešov, Holice, Holovousy, Horka n. Mor., Hořice, Hostivař, Hronov nad Metují, Chomýž, Jabloně nad Orlicí, Jablonec nad Nisou, Kolín nad Labem, Kopřivnice, Kvačice, Lazy, Nahošovice, Nové Zámky, Opava, Ostrožské Předměstí, Pardubice, Písek, Plzeň, Postřelmov, Prácheň, Radvanice, Ráj, Ropice, Sedličná, Senice, Slezská Ostrava, Sloup, Stonava, Stupno, Okrouhlá, Šenov, Tisovec, Třebovice, Ústí nad Orlicí, Věmyslice, Vrchlabí, Vítkovice, Vyškov, Zvolenská Slatina.

259 ĉeĥosl. kongresanoj el 76 diversaj lokoj

En 65 el tiuj 76 diversaj lokoj, t. e. en 85.53% UEA havas siajn delegitojn,

en 11 el tiuj 76 diversaj lokoj, t. e. en 14.47% ne funkcias UEA-delegitoj.

Ĉar estas en intereso de la movado kaj de la lokoj mem, ke en ĉiu loko funkcio delegito de Universala esperanto-asocio, ni citas la 11 lokojn:

Kunovice, Litovel, Těšetice, Uherské Hradiště, Česká Třebová, Holovousy, Hostivař, Chomýž, Kvačice, Nahošovice kaj Postřelmov.

Ne estas necese aparte substreki, ke ni havas grandan intereson trovi en ĉi tiuj lokoj fidiindan homon, kiu estus preta serioze kunlaboradi.

La organizanto rajtas atendi post ĉiu granda manifestado — kaj la kongreso en Olomouc estis tia — vigligon de la intereso pri la organizaj centroj: aliĝoj, informpetoj, kotizoj, propono de aktiva kunlaborado, ktp. En tiu direkto la rezulto de nia V-a kongreso estas minimuma. — Skl.

Esperanto kaj stenografio.

La intereso pri Esperanto-stenografio kreskas iom post iom. La Germana Stenograf-Unio „Stolze-Schrey“ en Berlino informas nin pri apero de 2 interesaj artikoloj pri Esperanto-stenografio ĝenerale kaj la adapto de la sistemo Stolze-Schrey en la plej disvastigita stenografi-organo germana „Der Schriftwart“. Ambaŭ artikoloj estas verkitaj de Roberto Kreuz, L. K., direktoro de la I. C. K. en Genevo kaj konata stenografo laŭ la nomita sistemo. La adapto de la sistemo, alfarita al 20 lingvoj, estas sukcese uzata de multaj por stenografi Esperanton.

Problemo de instruado.

Certa blinda instituto en Praha enkondukis instruadon de esp-o (pagatan), kiu gvidis juna samideano, jam multe konata inter ni. Forirante el Praha, li rekomendis kiel novan instruiston sian fraton, Post nelonge la direkcio devis ĉesigi la instruadon kaj serĉi alian instruiston, ĉar montriĝis, ke „la junulo scias malpli ol liaj lernantoj“. Malĝoja fakto, ĉu ne? Vi certe konsentas, ke estas pli bone tute ne instrui ol instrui malbone. Nur kiel averton por similaj okazoj ni publikigas tion ĉi; pro tio ni ellasis la nomojn. —

NOVAJ LIBROJ.

Eldonitaj de

Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mester-u 53, Hungarujo.

La pentroatro en la Malnova Hungarujo. Verkis Istvan Genthon, Tradukis Francisko Szilágyi LK. Formato 25×18 cm kun 96 tuŝpaĝaj ilustraĵoj sur peza kretopapero kaj 72 paĝoj da klariga teksto sur unuakvalita nederlanda papero. En arta duonfendo bindita. Prezo 3.— dolaroj plus 10% por sendkostoj. (Kĉ 110.—.)

La simpla Esperanto. La gramatiko de esperanto en 16 facilaj lecionoj. Verkis Dr. Francisko Szilágyi LK. Kun 33 ilustraĵoj. La sola ilustrita gramatiko por hungaroj. 23×15 cm, 40 dense kompostitaj paĝoj. Prezo kune kun aldonita hungara ŝlosilo 0.26 dolaroj. Aldonu 10% por sendkostoj. (10 Kĉ.)

Trans la fabeloceano. Originalaj noveloj de Francisko Szilágyi. Volumo 136-paĝa kun 15 ilustraĵoj sur peza senligna papero. Formato 20×13.5 cm. Kun dukolora ŝirmkovrilo. Prezo broŝurita 0.60 dolaroj, bindita 1.— dol. Aldonu 10% por sendkostoj. (Kĉ 22.—, resp. 38.—.)

De Paĝo al Paĝo, literaturaj profiloj. Kritikaj studoj pri 11 esperantistaj verkistoj kaj tradukistoj. Verkis Ludoviko Totsche, redaktoro de Literatura Mondo. Volumo 120 paĝa sur peza senligna papero, kun dukolora ŝirmkovrilo. Formato 20×15.5 cm. Prezo broŝurita 0.50 dolaroj, bindita 0.80 dol. Aldonu 10% por sendkostoj. (Kĉ 20.—, resp. 30.—.)

Goethe: Romaj elegioj kaj La Taglibro. Tradukis el la germana Kolomano Kalocsay. La libreto enhavas la erotikajn poemojn de la senmorta majstro, kies jubileon ĵus festis la mondo. La volumo en formato de 14.5×11 cm ampleksas 80 paĝojn kun 6 tuŝpaĝaj ilustraĵoj. Sur peza glata papero, dukolore presita, kun dukolora ŝirmkovrilo. Prezo: broŝurita 0.35, bin-

dita 0.55 dolaroj. Sur luksa kretopapero, en silka bindo 50 numeritaj ekzempleroj kun la propramane subskribo de la tradukanto po 1.— dolaro. Aldonu 10% por sendkostoj. (Kĉ 13.50, resp. 20.—, resp. 40.—.)

Ĉiuj mendeblaj pere de S-ro O. Sklenčka, Hradec Král. 628.

Geografia Karto de la antikva Roma Imperio.

La estraro de la ŝtata Itala Komitato de la Eltrovoj decidis partopreni per speciala kunlaboro de italaj kompetentuloj je la verkado de la Internacia Geografia Karto de la Roma Imperio proponita jam en la j. 1928 de Prof. Crawford ĉe la Geografia Kongreso de Cambridge, kaj je kies eldono baldaŭ zorgos la Internacia Ofico de la Geografia Karto je skalo de 1:1000000.

V kursech, které chystáte, použijte... Svým známým k domácímu učení doporučujte....

**UČEBNÍCI A CVIČEBNÍCI
MEZINÁRODNÍHO JAZYKA**

ESPERANTO

OD PROF. DRA ANT. ŠILHY

96 stran. — Cena Kĉ 10-60 s portem

Při odběru aspoň 5 výtisků sleva.

Vydalo La Progreso, Praha VII.

INSIGNOJN

(verda stelo sur blanka rinda fono) liveros al vi Esperantista Klubo en Praha (Kavárna Louvre, Národní tř.). Malgranda por 3 Kĉ, pli granda por 4 Kĉ plus 1 Kĉ afranko. Ĉe pli grandaj kvantoj rabato.

REDAKCIA.

Ĉar la redaktoro havis ŝanĝojn en sia profesia okupo, kiuj plene ekokupis lin tuj post lia resaniĝo, la septembra numero ne povis aperi. Tial ni kunigis ĝin kun la oktobra. Ne malgrandiginte la nombron de la paĝoj ni povas alporti vicon da pli longaj artikoloj kiuj espreble trovos intereson ĉe niaj legantoj. La novembro numero aperos post nelonge.

Ni uzas la okazon por peti la ŝuldots, ke ili afable fine pagu la abonon 1932.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA XIX. URALSKÉ NÁM. 447.
NUMERO 47. - OKTOBRO 1932.

LA IV. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE.

okazis merkrede la 15. Junio 1932 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis Herzigová, Janda, Dr. Pitlík, Sedláček, Slavík, Sustr, Tarantíková. Senkulpiĝis sin: Hromada per malsano, Fr. Staněk kaj Votrubec per alia okupo, Staněk Mil. per vojaĝo. — Prezidis dr. Pitlík, protokolis Tarantíková. — Daŭro de 21 ĝis 23.45 horo. El la protokolo:

Kongreso Olomouc.

Al la kritikoj en Ligilo la ĉeestantaj partoprenintoj konstatas, ke la punktoj pri la gazetoj estis sur la programo. La estraro ne havis ion por diri (la temon ne proponis ĝi) kaj nek la proponintoj nek iu alia petis parolon pri ĝi. — Financa raporto kaj statistiko pri la kongresanoj estas atendata. — Al la kongresa rezolucio pri radio respondis Radiojournal, ke principe ili konsentas disaŭdigi esperantoparoladojn, se ili estos verkitaĵoj de unuarangaj fakuloj. — La komuna kunveno de estraroj de ĈAE kaj GEL okazis en Olomouc la 14. V. kaj partoprenis ĝin por LKK S-ro Kudela. La kunveno interkonsentis pri la ideo gvidado de la kongreso kaj ellaboris la rezoluciojn. — Nome de ĈAE S-ro Ginz sendis dankleteron al la fervoja direkcio pro la ekspedo de la speciala vagonaro al Olomouc. — La asociaj flagoj redonitaj de LKK troviĝas ĉe S-ro Ginz. — La ekspozicia materialo ĝis nun ne revenis.

Pariza kongreso.

Principe interkonsentite sendi reprezentanton de ĈAE. D-ro Pitlík, kiu proksimume en la sama tempo estos en Parizo proponas sin, se Asocio pagos al li subvencion 500 Kč kaj kongresan kotizon. Akceptite.

Literatura Mondo.

S-ro Ginz traktas pri eldono de ĉeĥoslovaka numero kun la eldonantoj kaj kun unu ministerio.

Labora kunsido en Mladá Boleslav.

Asocion reprezentos S-ro Sustr kaj multnombra partopreno estos rekomendata en Klubo de Praha.

Zamenhof-strato.

Kune kun GEL ni traktas ĉe certa urbestro pri nomigo de unu strato.

Stacidomaj tabuloj kaj poŝtkartoj.

Pri la aferoj laboras S-ro Ginz.

Gvidlibro pri Praha.

Dua eldono (3.000 ekz.) estas preparata.

Japana Esperanto-Instituto

sendis 100 japanajn ŝlosilojn interŝanĝe por 50 ĉeĥaj kaj 50 slovakaj. La japanaj ŝlosiloj estas riceveblaj laŭ adreso de ĈAE.

Lingva Sekcio.

Estis akceptita propono de la redakcio de Progreso fondi L. S., en kiu kuniĝus ĉs. samideanoj por lingvaj laboroj. (Vidu la alvokon sur p. 76.)

LA V. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis merkrede la 24. Aŭgusto 1932 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis Echnér, Hromada, Janda, Dr. Pitlík, Sedláček, Slavík, Staněk Fr. kaj Votrubec. — Senkulpiĝis Herzigová kaj Sklenčka. — Leterojn sendis Dr. Kamaryt kaj Vondroušek. — Prezidis Dr. Pitlík, protokolis Slavík. — Daŭro de 20.30 ĝis 23.30 horo. — El la protokolo:

Kongreso en Parizo.

Dro Pitlík raportas pri ĝi: Partoprenis 1600 p. el 35 landoj (el ĈSR cca 40 p.) kaj 12 delegitoj registaraj. Por nia eksterlanda ministerio salutis Dr. Novotný, sekretario de nia ambasadoro en Paris. La ĉefa temo dum la kongreso estis la reorganizo. Por ĝi venis kelke da proponoj, el kiuj estis akceptita bloke la franca, post unu laŭtlego kaj sen detala esploro de ĝiaj detaloj. Voĉdonis por 5401 voĉoj, kontraŭ 1342, detenis sin 816. Nia delegito voĉdonis kontraŭ, kaj krome, kun la delegitoj de Naciaj Societoj Svisa, Nederlanda, Belĝa kaj kun GEL li subskribis proteston kontraŭ la neregula voĉdonado. Ĉis la fino de oktobro la elektita komisiono (Dubois, Hovorka, Goldsmith, Schmalz, Canuto, Schoofa, Malmgreen) devas prezenti statuton

de la nova organizaĵo. La II. kunveno de la Generala Estraro sekve de tio ne plu okazis.

La komitato de CAE opinias, ke la nuna tempo neniel estas taŭga por reorganizi, kaj havas impreson laŭ la prezentita raporto, ke la reorganizan tendencon influas motivoj personaj kaj politikaj.

En la UEA-kunveno estis transdonita honora donaco (horloĝo) al S-ro Ginz, Ĉefdelegito de UEA en Praha, loko, kie estas la plej granda nombro de UEA-anoj.

La preparata speciala vagonaro al Parizo ne estis ekspedita de la fervoja direkcio. Malgraŭ la malfrue veninta sciigo pri tio CAE sukcesis aranĝi oportunan karavanan vojaĝon al la XXIV-a. Partoprenis ĝin 38 personoj, gvidis s-ro O. Ginz.

Gvidfolio en Praha.

Dua eldono de tiu luksa presaĵo, reverkita de S-ro H. K. Bouška, estas ricevebla ĉe Asocio. Niaj membroj, kiuj volas ĝin havi inter siaj dokumentoj, povas ĝin ricevi por 1.20 Kč afrankite. Tiuj membroj, kiuj povas ĝin dissendi al taŭgaj fremdaj adresoj, ricevos la bezonan kvanton senpage; ili skribu al ni pri sia intenco kaj sciigu la adresojn. Eksterlandanoj ricevos ĝin senpage. Poŝtkarto al CAE. sufiĉas.

Poŝtkartoj kun skizo de ĈSR-landkarto

jam aperis kaj estas riceveblaj 10 ekz. por 2.20 Kč afrankite ĉe nia kasisto S-ro O. Sklenčka, Hradec Králové 628a. Ili estas tre taŭgaj por korespondado kun eksterlandanoj. La antaŭmendoj jam ricevis ilin. Kiuj ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj sendi la sumon indikitan sur la paĝilo, aldonita al la sendaĵo.

VI. KOMITATA KUNVENO DE CAE

okazis merkrede la 7. Septembro 1932 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis: Echtner, Ginz, Herzigová, Janda, Dr. Pítlik, Sedláček, Slávik, Staněk Frant., Sustr, Tarantíková. Senkulpigis sin Hromada kaj Staněk Mil. — Prezidis Dro Pítlik, protokolis Tarantíková. — Daŭro de 20.30 ĝis 23 horo.

Paroladoj de S-ro Bleier en ĈSR.

Literatura Mondo proponas aranĝi 14tagan paroladvojaĝon de S-ro Bleier laŭ temo: Esperantoverkoj kaj verkistoj. La parolado estus por la kluboj senpage, S-ro Bleier havus la rajton vendi la librojn. Principe akceptite. S-ro Ginz traktos kun la kluboj.

Kongreso en Olomouc.

La LKK sendis jam la necesajn datojn pri la kongresanoj al S-ro Sklenčka. Lia statistika artikolo aperos en Progreso. (Vidu en tiu ĉi nro.) — La raporto financa estas ankoraŭ atendata.

Esperanto inter Skoltoj.

La venontan jaron okazas apud Budapeŝt skolta internacia ĵamboreo. S-ro Balkanyi el Budapeŝt proponas al ni fari inter ĉsl. skoltoj paroladojn lumbildajn pri Budapeŝt. La hungaraj esperantistoj multe klopodas, ke esperanto estu vaste uzata. La necesaj intervenoj estos faritaj. (Vidu ankaŭ alvokon de S-ro Csáder en la nuna numero!)

Diversaĵoj.

CAE dankis al la garnizona komando en Bzenec pro aranĝo de la parolado pri esperanto al 300 soldatoj. (Vidu la Movadon en ĈSR). — Propono pri la propaganda vojaĝo de negro Ajay estis prokrastita. — Laŭ instigo de ICK ni intervenos ĉe la ĉsl. membroj de la Internacia Instituto de Sparkasoj en Milano. — CAE instigas siajn membrojn ricevi la informojn de Internacia Laboroficejo publikigatajn el ĝia Bulteno, aldonata al Esperanto de UEA. — S-ro Rud. Beneš, Del. de UEA en Zelezný Brod, tradukis ĉefe la esperantan alvokon pri la bruldetruita universitato en Valencia. Ni ĝin multoblighos kaj disvastigos.

Studenta Sekcio. Ing. VI. Sedláček, ĝia nuna reprezentanto en la komitato, foriras el Praha. La Sekcio delegu alian el siaj membroj.

Junulara Sekcio. S-ro Echtner donas raporton pri sia nuna laboro kaj la planoj.

S-ro Scherer informas, ke la 20. Julio li faris en Los Angeles paroladon lumbildan pri „La bela Praha“, kiun ĉeestis kelkaj centoj da personoj. Ni kore dankas al S-ro Scherer.

Slovníky:

Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper., váz. Jediný česko-esp. slovník, 25.000 slov	31.—
Čánský-Riedl: Slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho slov, i odborných	21.—
Filip Jan: Velký slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho odvozenin 41.—, váz.	51.—
Hromada-Petr: Slovník esper.-český. Přes 5.000 slov. Váz.	6.80

MOVADO EN ĈSR.

Praha. Esp. Klubo aranĝas kurson en Ier-nejo sur Uhelné náměstí. Vizitas ĝin 31 p., instruas denove S-ro Frant. Staněk. Por propagando de la kurso per afiŝoj estis uzitaj krom ĈAE-afiŝoj, kiuj estis elgluitaj dum 7 tagoj, ankoraŭ specialaj flugfolioj. hm.

Brno. Pri la Propaganda semajno la klubo anoncas: De la 1. Oktobro dum 3 semajnoj estis elgluitaj 400 afiŝoj, varbantaj por la kurso. En 5—6 ĵurnaloj aperis 4foje anonco pri komenco de la kurso. Provizora rezulto: 11 novaj, 4 malnovaj kursanoj. Instruas S-ro Vondroušek. Por la propagando la klubo uzis entute 50 kartonajn afiŝojn de ĈAE. of.

Brno-Maloměřice. Kurson gvidas s-ro Instruisto Jeřábek. jv.

Tuřany. Kurson gvidas s-ro instruisto Hoffner.

Bzenec. En ĉi tiea artileria kazerno estis aranĝita la 30. Aŭgusto prelego pri graveco de la internacia lingvo Esperanto. La prelegon, kiun faris instruisto S-ro Dolfa Bartošik el Uherský Ostroh, devis partopreni soldatoj de la regimento en la nombro de 300 personoj, ĉar laŭ la ordono de regimentestro s-ro Klíma ĝi okazis dum la posttagmezaj laborhoroj anstataŭ alia okupo. La aŭskultantoj estis Ĉeĥoj, Germanoj kaj plejparte Hungaroj, tial la prelego devis esti interpretita parte hungare. La paroladon en la kazerno prizongis S-ro Fred. Kuhner, del. de UEA. db.

Bzenec. S-ro Fred. Kuhner, del. de UEA, sukcesis varbi 49 p., kiuj vizitas kurson gvidatan de s-ro Bartošik, instruisto en Boršice apud Buchovice. La kurson vizitas ankaŭ 17 soldatoj. Ni ŝuldas grandan dankon al s-ro Klíma, kiu permesis aranĝi paroladon pri esperanto en la kazerno. bk

Bakov. En kadro de la Propaganda semajno okazis publika parolado en hotelo Radnice tre sukcesa pro tio, ke ĝin vizitis nia kontraŭulo okcidentalisto Podobský, kiu devis kapitulaci antaŭ prof. Kožený el Mladá Boleslav. Tiu ĉi en bela duhora parolado resumis ĉion, kion oni povas hodiaŭ per esperanto akiri. La diskuton partoprenis s-ro Malý, instruisto el Mnichovo Hradiště, s-ro Reichelt, redaktoro el Mladá Boleslav kaj s-roj Pytloun kaj Peroutka el Bakov. — Dimanĉe nia klubo metis 100 flugfoliojn Pojítko en gazetojn, disvendatajn en nia urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Kino Sokol projekcias la tutan jaron tre belan diapozitivon kun esp. stelo, mendebian ĉe s-ro Kilian. — La 12.

Oktobro komencis kurso gvidata de s-ro Moc, disĉiplo de s-ro Pytloun; vizitas ĝin 5 novaj membroj kaj kelkaj el la antaŭa kurso. fp.

Hradec Králové. La klubo kunvenas jaŭde en sia klubejo en restoracio Adalbertinum. La libretoj de Kenngott bone servis al ni, kaj sukcesa montriĝis ankaŭ la sinsekva prezidado de niaj membroj; tre utila estis la aldona legado el Originala Verkaro de Dro Zamenhof. Korespondataĵoj: venis 39, forsendite 935. Informa tabulo sur la placo Velké náměstí, zorgata de ges-oj Dolanský bone plenumas sian celon. Pri la propagando en la loka gazetaro zorgas s-roj Borovka kaj Jarka Dolanský. of.

Nymburk. La klubo havis dum 1931 kaj ĝis fino de junio 1932 du ĝeneralaĵn, 12 membrajn kunvenojn, akceptis 6 leterojn kaj presajojn, forsendis 30 leterojn. En la aŭtuna kurso restis ĝis la fino 7 p., kiuj aliĝis al la klubo, krom kelkaj anoj subtenantaj. Kluba kotizo estas 6 Kč jare, la klubo havas 15 membrojn, kiuj posedas la lingvon kaj 10 anojn subtenantajn. jb. et.

Kolín. Jarkunveno de la Klubo 12. II. La klubo havis 25 membrojn. La kunvenoj estis 26. Estis elektitaj: prez. Ferd. Bendl, vicprez. J. Drahovzal, sekr. J. Václavek, kasisto St. Hermoch. Kunvenoj ĉiun duan kaj kvaran vendredon en Lidový dům. Adr.: prez. F. Bendl, direktoro de advokata oficejo, Kouřimská 9, Kolín.

Karvinná. Laborkunsido de Regiona Esperanlista Ligo 10. IV. en ejo de societo Praha. Ĉe estis 150 personoj el 21 lokoj inter ili multaj kursanoj. Prez. s-ro Krysta. Estis proklamita rezulto de la traduka konkurso de la kursanoj. Unu estis premiita per donaco de libroj la dua per pago de vojaĝo Olomoucon.

Olomouc. Jara kunveno de la E. Societo 14. IV. El la sekretaria raporto: Por propagando estis uzataj ĉefaj ŝlosiloj, flugfolio Pojítko kaj specialaj varbiloj por kursoj. Publikaj kursoj estis 6 (5 Cseh-metodaj de Neužil, 1 de Kudela) unu kurso por studentoj de la Komerca Akademio. La societo abonas 12 gazetojn. En la biblioteko de la Hus-legejo estas jam 416 esperantolibroj venintaj tien per donaco de la societo kaj de ĝiaj anoj (Kudela). Membroj: 5 honoraj, 4 dumvivaj, 27 aktivaj, 23 subtenantaj. Inter ili estas 7 ĈAE-anoj, 51 UEA-anoj. La societo vigle kunlaboris por la Olomouca kongreso. Estis elektitaj: prez. A. Kudela, vicprez. Neužil, sekr. Pittner, kasisto Mrázková, komitatanoj Golla, Kuba, Mastný, Macháček, Jedlička, Poděbrad, Socha, Vařenta. Revizoroj: Blažek, Schaubhuber.

ESPERANTO EN LA V. INT. KONGRESO POR SEKSA REFORMO EN BRNO.

La 21. Septembro 1932 la kongreso estis sole malfermita. Unu el la 3 prezidantoj de la Ligo kaj de la kongreso, D-ro Leunbach el Köbenhavn en la enkonduka parolado informis pri malfacilaĵoj de la kunlaboro kaj pri la rolo, kiun esperanto povas ludi en ĝi. Inter salutantoj de la kongreso estis s-ro Baĉura, prez. de E. Klubo Brno, kiu parolis nome de esperantistoj de Brno.

Al la kongresa sekretario D-ro Weisskopf ni disponigis gvidlibrojn pri Praha kaj Tatry (ricevitajn de CAE) kaj pri Moravia Karsto (je kosto de la klubo).

Ĵaŭde la 22. IX. vespere okazis publika kunveno en la halo de DOPZ. D-ro Leunbach parolis pri la temo „Kial seksreformon?“ komence germane, poste li resumis kaj daŭrigis en esperanto.

Vendrede la 23. IX. posttagmeze la radiostacio Brno disaŭdigis intervjuon kun kongresaj eminentuloj. D-ro Leunbach parolis denove en esperanto. Li montriĝis konscia propagandanto por E. Lia propagando certe efikis ne nur en sciencaj rondoj, sed ankaŭ en la vasta publiko. Tiun efikon subtenis lia tre simpatia kaj reprezentativa personeco. Ankaŭ D-ro Magnus Hirschfeld, prez. de la kongreso, laŭdire parolas bone esperanton.

jv

KONFERENCO DE IFETT EN PRAHA.

La I. konferenco de Internacia Federacio de Esperantista Trafik- kaj Transportlaboristaro (IFETT) okazis en Repraŭnta domo de Praha la 11. Aŭgusto 1932 en kadro de la kongreso de la Internacia Transportlaborista Federacio (ITF). Tiun ĉi kongreson partoprenis 195 oficialaj delegitoj de 62 sindikatoj, organizantaj entute 2,294.066 membrojn. La delegitoj venis el 27 landoj, inter ili 4 ekstereŭropaj.

En la I. konferenco de IFETT estis reprezentitaj: Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Germanio, Nederlando, Svedlando kaj Svislando. ITF estis reprezentata de k-do A. Klatil, la Internacia oficejo de k-do J. Slezak, prez. kaj de A. Berdan, sekr. K-do Nathans pro subita malsaniĝo dum la kongreso en Praha ne povis viziti la kunvenon. Salutparolis ankaŭ k-do Pech el Plzeň. IFETT havas 260 membrojn, sekciojn en 6 landoj kaj asesorojn en pliaj landoj. La rilatoj kun landaj sindikatoj de ITF estas en kelkaj landoj bonaj, kvankam multaj sindikatoj ĝis nun ne ekkomprenis la gravecon de esp.

La sindikatoj en Aŭstrio kaj Holando ankaŭ finance subtenas la IFETT-sekciojn.

K-do Klatil skizis, kiel peniga estas la laboro ĉe la samtempe okazanta ITF-kongreso pro la lingvodiverseco. Kvankam oni tradukas la referaĵojn en 6 lingvojn, tio tute ne sufiĉas, ĉar la membraro de ITF parolas proksimume 35 lingvojn. ITF eldonas siajn publikajojn en 5 lingvoj. Ankaŭ tio ne sufiĉas. ITF povus korespondi kun la sindikatoj en esperanto, sed bedaŭrinde neniu el ili praktikas esperanton, kaj ITF ne povas altrudi esperanton al ili aŭ al la anaro; Postulo pri esp-o devas veni de malsupre kaj tio estas tasko por landaj IFETT-sekcioj. — La Int. Oficejon gvidos la holanda sekcio, ĉar la aŭstria estas tro ŝarĝita.

SALUTVESPEROJ EN PRAHA KAJ PLZEŇ OKAZE DE LA IFETT-KONFERENCO.

Vendrede la 12. VIII. la Laborista Ligo Esp. okazigis salutvesperon. Por la Ligo salutis K-do J. Fox. Por IFETT dankis Slezak pro la gastama akcepto, aranĝo de la ekspozicio, speciale al k-do Fox, kiu dediĉis siajn feriotagojn por ĝia instalaĵo kaj por gvidado de la eksterlandaj gastoj tra Praha.

Sabate la 13. VIII. preskaŭ ĉiuj konferencanoj veturis al Plzeň, kie ilin atendis multaj kamaradoj; ili vizitis tie hospitalon por akcidentintaj laboristoj, bierfarejon „Plzeň-prafonto“ kaj kooperativan domon. Vespere okazis granda salutvespero en la sindikata domo. of

ALVOKO AL NE-SKOLTOJ.

La skolta movado verŝajne jam estas konata al Vi, kara leganto. Dum la lasta vintro Vi povis legi pli ofte pri ĝi en „La Progreso“.

Sed nur malmultaj inter Vi pensis pri tio, ke estus utile alligi la skoltaron al nia movado. La junularo estas la estonto, ni zorgu do pri ĝi.

Nun doniĝas bona okazo. La sekvontan someron okazos en Gödöllő, apud la hungara ĉefurbo la 4-a ĵamboreo, kiun partoprenos ĉirkaŭ 30 mil skoltoj el la tuta mondo. Ĉe tiaj grandmezuraj internaciaj kunvenoj oni forte sentas la mankon de komuna lingvo, tial ni devas profiti la okazon kaj pruvi al la ĉefuloj de la skolta movado, ke Esperanto estas utila al ili.

La Hungara Skolta Asocio jam komprenis tion kaj la prepara komitato montris bonan ekzemplon starigante apartan esperanto-taĉmenton en la kadro de la ĵamborea policiŝtaro. La eldonota 5 lingva vortaro enhavos Esperanton kaj ver-

ŝajne ankaŭ la plurlingva jamborea ĵurnalo. Estas promesite, ke dum la vesperaj tendarfajroj estos rezervata tempo por Esp. programo. Oni eldonis ankaŭ belajn propagandajn sigelmorkojn en Esp. kun la simbola bildo de la jamboreo.

Nun estas la tasko de ni aliĝantaj skolto-esperantistoj, ke ni zorgu pri tio, ke plej multaj el la ĉesestontoj al la jamboreo scipovon nian lingvon. Sed ni skoltoj-samideanoj estas tro malmultaj kaj ne povus efike labori, ne povus atingi atentindajn sukcesojn.

Tial mi alvokas Vin ĉiujn, karaj gesamideanoj! Atentigu la skoltojn de Via loko pri la utileco de Esp. ĉe tia multlingva kunveno, en lando, kies lingvo estas nenie konata, malfacile lernebla. Esperanto estas unu el la oficialaj lingvoj

La skolto devas fari ĉiutage ion bonan. Farigu por hodiaŭ anime skolto. Kiel hodiaŭa bonaĝo: vizitu la skoltan trupon de Via loko kaj varbu ilin por Esperanto.

Por la bono de la Esperanto movado.

Por ĉiuj fiurilataj sciigoj anticipu dankas en la nomo de la

Skolta Esperantista Ligo

Aleks. Csáder,

Bratislava I.,

Zámočnická ul. 8.

ESPERANTO INTER LA SKOLTOJ!

Laŭ deziro de S-ro Aleks. Csáder en Bratislava ni publikigas tiun ĉi alvokon. S-ro Csáder estis lastjare komisiita de ĈAE zorgi pri la disvastigo de E. inter la skoltaro. Li estas ĝis nun helpata en sia urbo de K. Kiss, A. Macek kaj G. Wurm, en Komárno de J. Havas. Entute en 14 lokoj de Slovakio kursoj por skoltoj estas en preparo. Sed en Bohemio kaj Moravio li havas kontakton kun skolto-samideanoj sole en 4 lokoj. Ni esperas, ke tiu ĉi alvoko helpos al li trovi pliajn kunlaborantojn. Red.

JUNULARA KOMISIONO.

Sub tiu ĉi nomo estas fondita laŭ iniciato de ges-roj Echnner nova fako ĉe ĈAE. Ĝia celo estas ekrilati kun infanoj kaj junuloj, lernantaj Esperanton laŭ la diversaj skribaj kursoj en infanzetetoj (Slovíčko, Mladý Svět, Malý Čtenář k. a.), por eduki kaj konservi, en iu ajn maniero, ilian intereson, kaj utiligi ĝin por la movado.

Tiu ĉi interesa provo estas sendube io nova en nia laboro. Ĝis nun oni ne atentis sufiĉe la eblecon kaj gravecon de tio, ligi la plej junajn adeptojn daŭre al nia afero. Kutime post fino de la kurso, se ne jam pli frue, la plej granda parto de la lernintoj perdas kontakton kun Esperanto kaj forlasis ĝin. Tio ne plu okazu! Ĉe la juna generacio kuŝas la plej granda forto por nia movado. Sed, ĉar mankas spertoj kaj ne ekzistas fiksa plano por tiu ĉi laboro (ĝi estas nur provo), ni volonte akceptos sugestojn kaj ideojn por atingi plej pozitivajn rezultojn. Same volonte ni akceptas adresojn de infanoj lernantaj Esperanton. Sendadu ilin al la komisionestro V. Echnner, Praha-Nusle II., 741, aŭ al ĈAE. VER.

ĈSL. GAZETARO KAJ ESPERANTO.

Karel Poláček en České Sl ovo 28. VIII. parolante sprite pri vira modo diras, ke senkolumajn ĉemizojn kun libera kolo portas sole iuj liberpensuloj kaj esperantistoj kaj kontraŭmetas bankdirektorojn kaj ministrojn, kiuj ne vestas sin tiel. Juĝu la ĵus somerumintaj esperantistoj, ĉu Poláček estas prava.

Pri la kongreso de la Internacia Transporta Federacio en Praha ni legis en multaj gazetoj kun mencio pri esperantista partopreno. Nová Doba Plzeň 20. VII. bonvenigas la viziton de esperantistaj delegitoj per longa artikolo kaj skribas pri ĝi denove la 14. VIII.

Portreton de la 90-jara danziga samideano Tuschinsky vizitinta la parizan kongreson alportis Slovenský denník Bratislava 13. VIII. La saman bildon ni vidis ankaŭ en Večer 6. VIII.

Přítel lidu 17. VIII. raportas laŭ la pariza Temps pri la lingvaj malfacilaĵoj inter la afrikaj negroj. Ili devas lerni laŭ siaj diversaj kaj sinsekvaj estroj france, germane, itale kaj angle. Ili atendas, ke la Ligo de Nacioj faros finon de tiu konfuzo enkondukante por la afrikaj negroj devige unusolan lingvon — la neŭtralan esperanton.

Pri la deveno de vortoj en Nár. Politika 18. VII. estas traduko de Ejs el la esperanta Lingva kritiko (aldono al Heroldo de Esperanto). Ni aŭdis, ke interesaj artikoloj tradukitaj el esperanto (Japanaj voĉoj pri Manĝurio, Bestoj en Indio) de J. Šupíková aperis en sama gazeto la 1. VII. kaj 17. VII., sed ili je nia bedaŭro ne venis antaŭ niajn okulojn.

Pri la kunveno de la slovako Sluchoviny kun Goethe skribas Horácko Třebíč 21. VII. En Třebíč ĉiuj gazetoj regule informas sian legantaron pri internacia lingvo. Estas sendube

grava afero se ĉiunonate kelkaj dekoj da artikoloj en tiu negranda urbo sciigas la loĝantaron pri nia marŝo. Gratulinda estas Třebíč kaj ĝia progresema gazetaro.

La rubriko „El esperanto mondo“ aperas en *Národní Politika*, plej disvastigita ĵurnalo ĉeĥoslovaka, nun regule preskaŭ ĉiusemajne en respektinda amplekso. La sama gazeto la 7. VII. sciigas, ke laŭ ordono de la polica prezidanto en Praha portas policanoj sciantaj esperanton sur sia deĵora vestaĵo esperantan ŝtelon. (Ne plu; estis sole dum la Sokol-festoj. Red.)

La slovakaj Gerner-Malohont Rimavská Sobota 20. VIII. alportas detalan artikolon de J. A. F. Vitek pri la pariza kongreso. La saman artikolon en ĉeĥa lingvo ni legis en *Hlas našeho venkova Jičín* 25. VIII.

En *Předvoj* 15. VIII. ni trovis la 7-an lecionon de esperanta kurso gvidata de Josef Pech.

Pri Basic English kaj esperanto skribas Oldřich Štěch en *Jednota*, revuo de la tramistoj de Praha, 15. VIII. Štěch klarigas ĝuste la senesperon de B. E.

La franco Jean Giraudoux diras laŭ *Duch Času Moravská Ostrava* 21. VIII.: Sporto estas la proksimiganta esperanto de nacioj.

Mladý svět, la junulara gazeto de ŝtata eldonejo daŭrigas nun post la libertempo sian rubrikon Per esperanto en la mondon, gvidatan de J. Šupichová. Ni havas la nron de 1. IX.

Nur nun ni legas en *Obchodní rozhledy* nro 5—6/1932, gazeto de la ekslernintoj de komercaj mezlernejoj, pri la preparoj al ilia ĝenerala kunveno. Proponis tie sro Zaba el Chrudim, ke ĉeĥoslovakaj mezlernejoj komercaj instruu devige ankaŭ esperanton.

O. G.

MEMBRA KOTIZO DE ĈAE

Kč 16.—.

(subtenantoj Kč 50.—, dumvivaj Kč 500.—).

ČLENSKÁ PREMIE :

- S = Svaz Národů o Esperantu 48 stran
- C = Collinson „Esperanto a jeho kritikové“ 24 stran
- V = Jak byl rozluštěn problém mezinárodního jazyka pro obchod a styk s cizinou. 44 stran
- Poj = 20 propagačních letáků „Pojitko“
- P = Paco per lernejo 32 stran
- D = Devoj de la homo 164 stran
- Z = 10 pohlednic s obrazem Dra Zamenhova.

Sendu aligan poŝtkarton

al *Otto Skleněka, kasisto de ĈAE, Hradec Král. 628a*

Ceteran korespondajlon por ĈAE adresu al

Praha XIX. Uralské, 447.

ZAMENHOF - KAJ ESPERANTO - STRATOJ

Laŭ nia scio ekzistas en la subaj urboj strato aŭ placo kun nomo de dro Zamenhof aŭ de esperanto. La redakcio danke akceptos eventualan kompletigon, kiu estas verŝajne ebla. Pri iuj el la urboj oni tre malmulton aŭdis en la esperanta gazetaro, kvankam temas pri grava honorigo de nia afero.

Amiens (Francio) — Rue Docteur Zamenhof.

Aracaju (Brazilio) — Rua Dr. Zamenhof.

Barcelona (Hispanio) — Carrer Dr. Zamenhof.

Białystok (Polio) — Ulica Zamenhova.

Boulogne-sur-Mer (Francio) — Place Esperanto.

Bratislava (Ĉeĥoslovakio) — Ulica dra Zamenhova.

Danzig (Libera ŝtato) — Esperantoweg, Esperantogrund.

Drahovice (Ĉeĥoslovakio) — Zamenhof-Strasse.

Dresden (Germanio) — Zamenhof-Strasse.

Lódź (Polio) — Ulica Zamenhova.

Milano (Italio) — Via Lud. Lazz. Zamenhof.

Nové Zámky (Ĉeĥoslovakio) — Ulica dra Zamenhova.

Olomouc (Ĉeĥoslovakio) — Ulice dra Zamenhova.

Rio de Janeiro (Brazilio) — Rua Zamenhof.

Rubi (Hispanio) — Carrer Zamenhof.

San Feliu de Guixols (Hispanio) — Carrer Zamenhof.

Sotteville-lès-Rouen (Francio) — Rue Docteur Zamenhof.

Terassa (Hispanio) — Plaseo Dr. Zamenhof.

Warszawa (Polio) — Ulica Zamenhova.

Wien (Aŭstrio) — Zamenhofgasse.

Sume 21 stratoj kaj placoj en 20 urboj de 9 ŝtatoj. Unuavice staras Ĉeĥoslovakio kaj Hispanio havantaj po 4 Zamenhof-stratoj, sekvas Francio kaj Polio po 3, Brazilio kaj Danzig po 2, Aŭstrio, Germanio kaj Italio po 1 strato.

O. G.

Samideanojn en la supre nomitaj urboj mi insistis petas, ke ili bonvolu al mi sendi po 3 bonaj fotografajoj el sia urbo montrantaj: 1-e ĝeneralan vidaĵon de la urbo, 2-e Zamenhof-straton aŭ placon kun videbla informa tabulo kaj 3-e angulan domon de la strato (placo) kun bona legebla informa tabulo portanta la nomon de Zamenhof aŭ de esperanto.

Estos preparita dokumentaro utila por ĉiu propagandisto.

Leterojn pri ĉi tiu afero bonvolu direkti al *Otto Ginz, Stárkova 4, Praha II.*

LINGVA FAKO

PŘEKLAD 34. TEXTU.

Svůj překlad textu uveřejněného v č. 6. nám zaslali: Ján Baculík Zv. Slatina, Lad. Czibur Železník, M. Havlásková Radvanice, Jan Janda Kolín, E. Klubo en Hradec Králové, Boh. Kohoutek Praha, Vojt. Matouš České Budějovice, Jos. Mňáčka Tišnov, Lad. Novák Přívoz, V. Pražák Kosmonosy, Val. Rosypal Háj, Jan Sieger Nýřany, Otto Sklenčka Hradec Králové, Al. Štěpán Hostivař, celkem 14 účastníků. Těší nás zejména, že se mezi nimi nachází opět několik nových samiček. Z nejlepších prací vylosován byl překlad pana V. Pražáka, Kosmonosy, jemuž zašleme knižní odměnu.

Egaleco.

La civítana egaleco, tio estas la egaleco antaŭ la juro¹⁾, estas dezirinda²⁾ kaj ebla. Sed egaleco de la interna valoro³⁾ de la homoj estas neebla. Neniam egalos la homoj⁴⁾ per siaj scioj kaj karakteroj. Sed progreso estas ebla sole per klopodo al⁵⁾ la plej alta perfekteco. Okazon por klerigo estas necese doni al ĉiuj⁶⁾. Ĉion oni devas oferi por ke estu kiel eble plej alte levita⁷⁾ la ekonomia, intelekta kaj morala nivelo de la plej vasta popolo.

Poznámky.

1. též: egaleco antaŭ la leĝo.
2. Žádoucí = dezirinda, nikoli postula (= žádaná).
3. hodnota = valoro, nikoli prezo (= cena).
4. neniam la homoj estos egalaj.
5. klopodo pri io, klopodo al io.
6. všimněte si, že slovo „všem“, které má důraz, stojí na konci.
7. por kiel eble plej altigi...

35. TEXT K PŘEKLADU.

Neběží nám o nic menšího nežli o vybudování takového životního umění a světového názoru, který city nepotlačuje, ale naopak je pěstí, je zesiluje, je hledí rozhojnit. Plný, silný, slunný život je dost dobrý pro nás. Proti církevnímu pěstění lítosti, smutků, strachů, červí morálky, stavíme city pozitivní, city, které považujeme za jedině zdravé vyjádření božského principu v nás.

(Z knihy „Rytmus tvůrčího života“ Norbert F. Čapek, k překladu zaslala pí Sklenčková.)

Práce zašlete co nejdříve.

CHYBY PŘI PŘEKLADÁNÍ.

Při překládání z cizího jazyka, a tudíž i z esperanta do mateřštiny, dbejme nejen smyslu slov a vět, ale i jazykové správnosti, a ducha jazyka českého!

1. Při překladu slov s předponou for = pryč je nesprávně užívatí rčení se slovem pryč, jehož se v češtině užívá často zbytečně:
 - fordoni — nepřekládejme: dáti pryč, nýbrž správně: odložití, odevzdatí,
 - forigii — nikoliv: dáti něco pryč, ale: odstraniti něco,
 - forigi — nikoliv: jíti pryč, ale: vzdáliti se, odebrati se někam,
 - foresti — nikoliv: býti, zůstatí pryč, ale: býti nepřítomen a pod.

2. Nadbytečné a nesprávné užití slova pryč čteme často i tam, kde v esperantu není předpona for:

estis pli ol naŭa horo = bylo po deváté (nikoliv: bylo devět pryč),

la kvina horo pasis = je po páté = minulo pět (nikoliv: je pět pryč) a pod.

3. Při překladu do češtiny neužívejme slov, jež nejsou utvořena v duchu češtiny:

plenpovo, plenrajtigo nepřekládejme: plnomocenství, ale: plná moc,

plenrajtigi nepřekládejme: zplnomocniti, ale správně: zmocniti někoho, dáti, uděliti plnou moc někomu, přeměsti plnou moc na někoho,

plenrajtigitó není plnomocník, ale: zmocněnec, atd.

4. V českém překladu neužívejme slov nečeských, hrubých, původu nízkého, rčení nepřekných, nesprávných, na příklad:

pro lardo neužívejme slova špek, ale slanina,

rafini nepřekládejme rafinováti, ale čistiti,

rafinejo = čistírna (nikoliv: rafinerie), paniko = poplach, zmatek (místo: panika).

Vyhýbejme se slovům nečeským a nesprávným!

5. Při překládání vyhýbejme se každé leda-bylosti a vybírejme z bohatého skladu jazykového spisovné češtiny slova nejsprávnější a nejrazovitější:

multe překládejme: mnoho, hojně, četně, nikoliv hodně, kterému lépe odpovídá inde (hodně, hoden, čeho hoden, podle zasloužení, cenně), jak vidno z překladu inda = hoden, hodný něčeho, zasluhující něco.

Také při překládání z češtiny do esperanta

dbejme přesného významu českého slova, abychom našli správný překlad:

6. V češtině často se užívá chybně slova druhdy; dává se mu nesprávně význam „kdysi“, „jindy“, „dříve“ a pak se překládá do esperanta nesprávně slovy iame (kdysi, někdy), siate mpe (svého času, kdysi), pli frue (dříve), antaŭe (předtím). Ve skutečnosti druhdy má význam časem, místy (la: interdum): druhdy nalezne se jetel čtyřlístý. Tudiž:

časem: tempe, de tempo al tempo, dum-tempe, dume,

místy: diversloke, ĉi tie, kaj tie,

druhdy: tempe, de tempo al tempo, diversloke, ĉi tie kaj tie. F. Rádek,

FRAZEOLOGIO.

Ni publikigas la unuan serion de elektitaj ĉefaj frazoj kaj parolturnoj, kiuj iam kaŭzas embarason por komencantaj esperantistoj. Apude ni metas esperantan tradukon, neniel pretekstante, ke ĝi estas la sole ebla. Pro tio ni volonte akceptas de niaj legantoj kunlaboron en tiu ĉi sfero.

I.

velmi mi na tom záleží, estas tre grave por mi aby... ke...

multe valoras por mi, ke...

mi havas multan interreson pri tio, ke...

namluviĵi někomu, že... kredigi iun, ke..

hrozim se toho tio teruras min

skoncovati něco v dobru fini la aferon pace..., per interkonsento

ta slova plati na vas tiuj vortoj celas vin..., adresigas al vi

ta smlouva již neplati la kontrakto ne plu validas

stejně pravidlo plati la sama regulo aplikiĝas zjednatí zákonu platnost respektigi la leĝon

býti v něčí moci esti en ies manoj

buďte tak dobrý havu la afablecon..., bonvolu

to má čas tio ne urĝas

po dvě léta dum du jaroj

po dvou létech post du jaroj

odešel už dávno li foriris jam antaŭ (tre) longe

nejsem s to to udělat mi ne povas, mi ne kapblas tion fari

nech toho pláče ĉesu plori

dítě se učí běhat la infano lernas iri

míchat se do něčeho miksi sin en ion

bratři něco za bernou (naive) kredi ion laŭminci

člověk ho musí mít rád oni ne povas ne ami lin jsem jiného mínění mi havas alian opinion

maje za to, že opiniante, ke to nic nedělá tio ne gravas, faras nenion, ne ĝenas

mocen němčiny scianta la germanan lingvon

světlice leží na dvůr la ĉambro rigardas al la korto

státí někomu ve světle kovri al iu la lumon, (sunon)

dávati život všanc riski la vivon

nevěděl radostí co dělat li ne sciis kion fari pro ĝojo

vede dobrou kuchyň ĉe li oni bone mangas

přišel jsem na své mi enspezis miajn elspezojn

marně si lámal hlavu li vane rompis al si la kapon, li vane cerbumis

byl na hlavu padlý li estis (iom) stulta

konečně jsem se dostal ke slovu fine mi ricevis parolon

to přijde právě vhod tio venos en la ĝusta momento

kdo přijde teď na řadu? kies vico estas nun?

šaty dělají člověka vesto faras la homon

zní mi v uších en miaj oreloj resonas

tak tak že je živ li havas apenaŭ por vivi

jak na to přicházíte? kio igas vin pensi tiel?

na jeho místo přišel... lian lokon (postenon) okupis

to ho silně zaujalo li estis forte interesita pri tio

zájemci hlase se u... interesatoj anoncu sin ĉe...

přichází vždy častěji li venas pli kaj pli ofte

nemá o tom poněti li tute ne havas imagon (scion) pri tio

také on se do té věci nkaŭ li implikis sin en zapletí tiun aferon

váš pan otec sinjoro via patro (slovosled!)

on si uměl pomoci li sciis kion fari, li sciis helpi sin

je tomu týden co pasis unu semajno de kiam...

přišel na buben lia havaĝo estis aukcie vendita

ruka ruku myje mano manon lavas

vydrží to počasí? ĉu la vetero daŭros? držeti s někým esti amiko de... esti infima kun... to ho bude stát krk tio kostos lian vivon

slovo má pan... la parolon havas sinjoro...
 prosim o slovo mi petas la parolon
 to máš z toho, že... jen la sekvoj de tio,
 ke...
 byl tam hodnou chvíli li estis tie sufiĉe longe
 v podstatě jedná se o esence temas pri tio...
 to...
 platí! bone! konsentite!
 šlo to hladce la afero iris glate, funkcio bone
 to je mi jedno estas egale por mi, indifere
 nte por mi
 na vaše zdraví! je via sano! sanon!
 ztratíť chuť k něčemu perdi la guston por io
 ložbe mu tak! tion li meritis!

hm.

KOMUNAJ NOMOJ EL LA PERSONAJ.

Estas konate, ke multaj nomoj de personoj fariĝis nomoj de objektoj kaj per tio vorto de ĝenerala vortaro. Klarigoj pri tiaj vortoj aperas dise en diversaj gazetoj. Interesan esp. kolekton de ili faris germana samideano Paul Bennemann (Leipzig) en nova gazeto „Lingva kritiko“ (unu el aldonoj de „Heroldo“, kiu per ĝi celas plenumi taskon neplenumatan de niaj lingvaj institucioj). Ni permesas al ni fari resuman liston el la artikolo de s-ano Bennemann („Ĉu vi konas sinjoron Boykot?“) sen rigardo al eventualaj eraroj de la aŭtoro:

agato — estas arbo trovita (laŭ Plinius) la unuan fojon ĉe la rivero Achatas (Sicilio),
 alabastro — estas ŝtono nomita laŭ Alabastro (Egiptujo), kie ĝi estas trovata,
 ampero — honoras la nomon de matematikisto kaj fizikisto Ampere (1775—1836),
 bajonetoj — estis unue fabrikataj en Bayonne (Francujo),
 baldakenoj — estis farataj el ŝtofoj el Bagdad,
 batisto — estis teksata jam en la 13a jarcento de Batiste Chambray,
 begonio — estas planto nomita laŭ Michal Begon,
 benzino — memorigas la nomon de inĝ. Benz, kiu en 1885 konstruis la unuan motorveturilon,
 bojkoto — estis venĝo aŭ puno farata de la loĝantaro kontraŭ bienestro Charles C. Boycott en Irlando (ĉ. 1880) per tio, ke oni rifuzis ĉiujn rilatojn kaj servojn al li, ĉar li multe premis siajn farmistojn,

caro — en tiu ĉi vorto sonas la nomo Caesar,
 dalio — estas planto, kiun el Meksikio alportis (ĉ. 1780) botanikisto Dahl,
 damasko — montras sian devenon el Damasko (Sirio),
 drakona — eternigas la nomon de Drako, kiu eldonis (621 a. Kr. en Grekujo) civilan kodon kun severegaj leĝoj (drakonaj ordonoj),
 drezino — estas simila al la prabicyklo konstruita (1817) de forĝisto Drais,
 fajenco — estas fabrikata en Faenza (Italujo),
 fazanoj — la unuaj estis ĉasataj kaj manĝataj ĉe la rivero Phasis (Kolhis),
 fezo — estas portataj en Fez,
 florenoj — estis unue stampitaj en Firenze (Florentia),
 floro — portas nomon de la diino Flora,
 fukcio — planto trovita de Leonard Fuchs en Meksikio (ĉ. 1540),
 galvanismo — konservas la nomon de anatomo Galvani (1737—1798),
 gazo — venis el Gaza (Palestino),
 georgino — estas planto nomita laŭ Georgi (Leningrado),
 gilotino — senkapigilo rekomendita de kuracisto Guillotin (1738—1814), kiam en la granda franca revolucio oni serĉis rapide kaj bone funkciantan mekanismon por senvivigi kontraŭulojn; la maŝino estis eltrovita de kirurgo Louis (tial ĝi estis nomata ankaŭ Louise),
 goblinoj — teksitaj bildotapiŝoj liverataj de la familio Gobelin al Henriko IVa,
 grogo — estis moknomo donita de soldatoj al admiralulo Vernon, kiu donis al ili anstataŭ pura rumo miksaĵon el rumo, sukero kaj varmega akvo,
 heleroj — estis unue stampataj en Hall (Germanujo),
 januaro — monato nomita laŭ dio Janus (duvizaĝa reĝanto de la jaro),
 julio — monato nomita laŭ Julius Caesar (kiu ne estis sole stratego, sed ankaŭ reforminto de la kalendaro),
 junio — laŭ diino Juno (edzino de Jupitero),
 kalikoto — venis el Kalikut (Hindujo),
 kamelio — floro el Japanujo importita de misiisto Camelli,
 kaŝtano — verŝajne devenas el Kastana (ĉe Nigra Maro),
 kravato — laŭdire estas nomata laŭ Kroatoj,
 kupro — devenas de insulo Cipro (Kypros),
 linĉi — estis privilegio de juĝisto John Lynch rajtigita punmortigi kaptitajn krimulojn sen ordinara juĝa procedo (tio estis direktita

kontraŭ negroj, kiuj en la 17-a jarcento fimigis la popolon per siaj krimfaroj),

magneto — magnetŝtono estis unue trovita en Magnesia,

magnolio — planto nomita laŭ Magnol (Francujo),

majo — laŭ diino de kresko Maja,

majoliko — estis fabrikato sur insulo Majorko,

makadami — tiu ideo devenas de Mac Adam (1756—1836), inspektisto por vojkonstruo en Skotujo,

mansardo — tiujn ĉi subtegmentajn loĝejojn komencis konstrui arkitekto Mansard (1646—1708),

marokeno — venis el Maroko,

marto — laŭ dio de milito Mars,

mirabeloj — devenas el Mirabeau (Francujo),

morfino — laŭ dio de dormo kaj sonĝoj Morpheus,

maŭzoleo — la unua grandioza tombomonumento estis al reĝo Mausolus (377—353 a. Kr.) en Halikarnassos,

narciso — planto, kiu laŭ legendo elkreskis el la sango de bela junulo Narkissos mortinta pro ampasio,

nikotino — venena alkaloido en la tabakplantoj devenas de la herbo nomita (de Dalechamps 1586) „herba nicotiana“ laŭ Jean Nicot de Violenain, kiu alportis semojn de la tabakplanto el la ĝardenoj de portugals reĝo Francujon,

omo — laŭ prof Ohm (1787—1854),

pasteloj — unue fabrikataj de nekonata itala sukerajisto estis en la 16-a jarcento importitaj de Firenze-ano Pastilla en Francujon,

persikoj — venis al ni el Persujo,

pergameno — devenas el Pergamens (Malgranda Azio),

pistoloj — estis fabrikataj en Pistoja (Italujo),

pralinoj — estis elpensitaj de kuiristo pro frandema marŝalo Du Pleissis - Praslin (+1675),

saksosfono — ĉefa instrumento de moderna jazbando estis konstruita jam de Adolphe Sax el Dinant (Belgujo, 1814—57), profesoro ĉe la konservatorio en Paris;

sandviĉoj — estis elpensitaj por Carl of Sandwich (18-a jarcento), kiu ordonis prepari por li malgrandajn bulkopecojn kun butero kaj sukeraĵoj, kiujn li povis manĝi ne bezonante interrompi la ludadon kaj forlasi la ludotablon por manĝi,

siluetoj — portretoj desegnitaj aŭ franĉitaj laŭ la ombro de vizaĝa profilo populariĝis en la tempo de Etienne de Silhouette ĉe la popolo malŝatata supera kortega oficisto de Ludoviko XVa; laŭ li oni nomis ĉion, kio aspektis malriĉe, malpompe, mizere „choses à la Silhouette“ (Silhouette-aĵo), ankaŭ tiujn portretojn,

ŝrapnelo — militilo eltrovita de Henry Schrapnell (1761—1842), —

tankoj — monstraj militaj maŝinoj elpensitaj de kolonelo Thomas Tank Bernal dum la lasta mondmilito,

tulo — devenas el Tulle,

volto — honoras la konstruinton de la unuaj elektraj elementoj grafon Volta (1745—1827),

zepelino — direktebla aerŝipo eltrovita de grafo Zeppelin (1838—1917), kiu mem portas la nomon de malgranda germana vilaĝo Zeppelin, de kie devenas lia familio.

Simile la vortoj akademio, arlekeno, begino, derbio, jezuitoj, ĵakeo, kolofono, kuĉero, laterano, lazatero, marionetoj, marcipano, mazurko, tarantelo k. m. a. estas nomoj de objektoj portantaj la nomojn de personoj. m. kv.

MI SERĈAS TRADUKANTOJN

en la regionoj, en kiuj oni legas ĉi tiun gazeton.

Ili devas:

1. esti kapablaj, bonstile kaj elegante traduki artikolojn verkitajn en Esperanto en sian nacian lingvon;

2. havi bonajn interrilatojn al gravaj gazetoj (ĉiutagaj aŭ periodaj) de sia lando, por instigi ilin al publikigo de artikoloj, kiuj rilatas ekonomiajn, industriajn kaj komercajn aferojn kaj estos laŭ sia enhavo valoraj kaj de publika intereso. —

Tiuj samideanoj, kiuj estos pretaj labori kun mi (por entrepreno cetere ankaŭ valora por nia Esperanto-propagando), estas petataj, skribi al mi tre baldaŭ sian adreson, por ke mi povu informi ilin pri mia laborplano, kaj por ke ni povu interrilati pri la reciprokaj kondiĉoj.

Kun samideana saluto

Prof. Dr. Dietterle,

Leipzig,

Beethovenstr. 19.

— Ĉu vi volus esti naskiĝinta en Londono? Ne, ne, dio gardu min, mi ne scias ja eĉ unu vorton anglan.

— Panjo, ĉu la oreloj apartenas al la vizaĝo aŭ al la kolo? — Kial? — Vi diris ja al Franjo, ke ŝi lavu al mi la vizaĝon, kaj ŝi volas lavi al mi ankaŭ la kolon.

O BASIC ENGLISH.

Článek dra Vočadla o projektu, zavést „zjednodušenou“ angličtinu jako pomocný mezinárodní jazyk, uveřejněný v 16. č. „Přítomnosti“ vzbudil mezi esperantisty zájem daleko větší, než u publika, jemuž byl adresován. Redakce „Přítomnosti“ uveřejnila v č. 18. dopis dra Kamaryta, který vyvracel tvrzení článku Vočadlova. Dopis dra Parmy vrátila s omluvou a s odůvodněním, že nechce začínat o věci dlouhou polemiku. Protože dopis dra Parmy obsahoval řadu velmi přesvědčivých důvodů proti projektu Basic English, uveřejňujeme z něho všechny podstatné části.

Redakce Progreso.

Dr. Vočadlo, pokud má na mysli mezinárodní jazyk, správně se obírá jen esperantem. Vytýká mu: je jazyk umělý, nemá za sebou bohatou literaturu, není řečí velikého kulturního národa, neudělalo za půl století takové pokroky, v jaké doufali jeho propagátoři a konečně je jazykem agglutinuujícím.

Ad 1. Umělým jazykem byl volapük. Z té doby datuje se námitka o umělém jazyku. Volapük byl nešťastně konstruován, vyžadoval ohromnou paměť. V principu však nelze odmítnouti možnost umělého jazyka, poněvadž jazyk není nic mystického, nýbrž výtvozem lidské inteligence stejně jako stroje: konec konců jde jen o to, jakou službu člověku prokazují. A tak jsme dnes svědky, že umělý automobil či vlak je člověku prospěšnější nežli přirozený kůň a koňský potah a nikdo se nepozastavuje — jako kdysi — nad jejich umělostí. Nejzajímavější však jest, že esperanto není umělým jazykem, nanejvýše je tak umělým, jako byla čeština v době prubuzenské. Esperantský slovník je složen z indo-germánských, převážně románských kmenů (na př. otec není v esperantu určitá skupina hlásek, řekněme SO, nýbrž patro), tvorba slov je germánská (na př. tchán, Stief-vater je bo-patro), tvorba vět je slovanská, mluvnické z části románská, z částí germánská — a jen z částí vlastní. Esperanto není tak umělé, jak se soudívá; jeho umělost spočívá v tom, že z jednotlivých jazyků vybralo si to nejlepší a spojilo to v nový syntetický jazyk ve snaze vytvořit jazyk dokonalejší nežli kterýkoli stávající.

Snad by vynikl význam pojmu „umělý“ jazyk lépe, kdyby se objasnila jeho základní vlastnost, totiž neživotnost. Umělý jazyk, toť jazyk mrtvý (obráceně to ovšem neplatí). Esperanto

však není jazyk mrtvý, protože prodělavá svůj vývoj jako národní jazyky s tím rozdílem, že vývoj národních jazyků není regulován, kdežto na vývoj esperanta působí nejen přirozené vlivy, nýbrž i oficiální instituce, která ex post nová slova a obraty schvaluje resp. zamítá. Dnešní esperanto je esperanto Zamenhofovo jen v kostce, ale „lingva trezoro“ je nesrovnatelně větší: jazyk se nemění, ale obohacuje. Životnost esperanta je patrna též z jeho literatury a tím dostáváme se

ad 2. Jazyk žijící 40 let nemůže mít literaturu jako jazyk žijící staletí. Z toho hlediska je esperantská literatura veliká. Stačilo by snad uvést, že jsou spisovatelé a opravdové talenty, kteří píší jen esperantem. Přál bych české literatuře na př. Baghyho. Přál bych jí také literární časopis úrovně „Literatura Mondo“. Publikoval jsem loni v Progreso studii, srovnávající vývoj esperantské a novočeské literatury a ukázal jsem, jaká je zde veliká obdoba. (I z toho je patrna životnost esperanta.) Esperantská literatura má Dobrovského (Zamenhofovy) jazykové studie, překlady klasických děl, romantické zpěvy kolárovské, Jungmanna (Wüster: Enciklopedia vortaro) atd., má i Palackého (Haefker: Jarmiloj pasas) a nachází se asi v tom stadiu jako česká literatura za Boženy Němcové. Dnes stává se již esperantská literatura tím, čím má vlastně býti: obrazem doby. Znam literáta, který se pustil do studia esperanta jen aby poznal jeho literaturu. Byl jsem dříve skeptickým, pokud šlo o esperantské básnictví, poněvadž si nelze představit vývoj jazyka bez poesie, která jazyk nejvíce tříbí a byl jsem proto v pochybách o osudu esperanta. Ale esperanto si našlo své vhodné formy slovní krásy a básníci jako Hohlov a Kalocsay a j. jsou na výši doby. O vyspělosti esperanta mluví také kniha „Esprimoj de sentoj en Esperanto“ od docenta dra Privata, ukazující, jak v esperantu nejen suchý fakt, nýbrž i citový stav dochází plného výrazu.

Ad 3. Esperanto prý není řečí velikého kulturního národa. Není, protože je jazykem mezinárodním a nemůže ani nesmí za ním státi některý národ, resp. některá národní kultura. Není správné říci, že Francouzi přijímají světovost angličtiny jako fait accompli, protože ji připouštějí jako druhý jazyk vedle francouzštiny. Propagovat určitý jazyk, znamená propagovat i jeho literaturu a kulturu a to si nedají ostatní národové jen tak líbiti. A také nelze to po nich žádati. Bylo by to nespravedlivé. Ze také ani nejmenší chuti k takové koncesi není, uvádím jako jeden doklad za velmi mnohé to,

že vedle Basic English existují Dajč (nevím již, jak se píše), Occidental a jiné jazykové pokusy jako projevy snahy učinit některou světovou řeč přístupnější. Basic English není nějaký skvělý nápad, nýbrž je zatím poslední v řadě pokusů o zjednodušení národních jazyků a bylo by zajímavé, kdyby lektorové francouzského, německého, ruského a j. jazyka se roze-psali o zjednodušení „jejich“ jazyka — uváděli by asi analogické důvody pro jeho přijetí jako dr. V. pro Basic English.

Ad 4. Autor myslí, že proti esperantu mluví i to, že esperanto za 40 let co existuje, neučinilo takové pokroky, jak si tvůrcové esp. hnutí přáli, ale chyba byla ne ve věci, nýbrž v lidech. V lidech, kteří naivně věřili v lidské pochopení, kteří mysleli, že když se lidem předloží dobrá věc, že ji s vděčností ihned přijmou. Zapomněli, že společenské reformy — a takovou je konec konců i mezinárodní jazyk — uskutečňují se ne z ideální lásky k společnosti, nýbrž z nutností. Dokud společnost není k něčemu nucena, neudělá to. To vidíme dnes na otázce odzbrojení i na způsobu, jakým se řeší hospodářská krize. Otázka mezinárodního jazyka dosud patu pozemšťanovu málo tlačí. Proto esperanto neuplatňuje se tak extensivně, aby to bilo do očí. Za to uplatňuje se intensivně: literárně a tím myšlenkovým světem („interna ideo“), jehož je slovním výrazem. Mezi Masarykovým humanismem a esperantskou interna ideo resp. homarismem můžete dát znaménko =. Supernacia (ale ne kontraŭnacia) je jeho přívlastkem. Do této myšlenkové sféry nikdy nevede cesta zjednodušeného národního jazyka, nýbrž jen jazyka opravdu mezinárodního. Není jich 540, to byly pokusy před zdařilým výsledkem, je jen jeden jediný.

Ad 5. Esperanto má prý vadu agglutinujícího jazyka. O tom je zde těžko mluvit. Kde se agglutinující stavba v esp. uplatňuje, je to jen k jeho prospěchu. Nyní několik slov o angličtině.

Sám jsem angličtinář-amatér, mám plné pochopení pro krásu a větný spád této řeči, ale jsem na tolik objektivní, abych uznal, že angličtina svou výslovností a zvláště výslovností přechetných jednoslabičných slov je těžko srozumitelnou, jak jsou o tom zkušenosti z radia, kinematografů a divadel. To, co způsobilo rozšíření angličtiny, nebyl jazyk sám. Byly to vnější okolnosti. Latínu držela moc katolické církve, francouzštinu francouzská osvěta, angličtinu učinily světovou anglické resp. USA kolonie a s tím související bohatství a politický vliv. Tak dochází v přítomné době angličtina největšího

důrazu, ale také ne všude: v Evropě uplatňují se více tisícovky kulturních Němců nežli miliony anglicky mluvících Indů a ovšem uplatňují se dle toho i jazykově.

Basic English je angličtina o 850 slovech se zjednodušenou mluvnicí, jmenovité se zjednodušenými slovesnými tvary. Tak tomu bylo i s jinými zjednodušenými jazyky a všechny zanikly. Předně to nedá, aby se člověk učil b. e. a neučil se úplně angličtině. Cožpak existuje auto bez pérování určené jen pro dřevěnou dlažbu? Kdyby takový vůz existoval, jeho majitel by si jistě vyjel přes hranice dlažby a vůz by šel brzy do správk. Stejně znalec zjednodušené angličtiny by brzy pocítil nedostatečnost jazyka, když by mluvil s někým, kdo zná jen úplný jazyk. Za druhé nemůže existovat jazyk s vymezeným slovníkem: nové potřeby tvoří nová slova, která musí být ihned po ruce. Není možno čekat, až se octnou ve slovníku. Braly by se přirozeně z nezjednodušeného jazyka a s nimi přebíraly by se i nepravdělnosti a komplikované tvary: medail by se vyloučily vliv národního jazyka na jazyk zjednodušený, který by nakonec podlehl. Last not least: naučit se dokonale nedokonalému jazyku anebo naučit se nedokonale dokonalému jazyku, to je již skoro stejné.

Konečně poslední stať Vočadlova článku. Autoritou Masarykovou zdůrazňuje význam anglosaské kultury a angličtiny. Je to obecný zjev, že ti z nás, kteří nemáme rodilé Češky za manželky, inklinujeme ke kultuře ženina národa. Jsou mezi námi Češi-Angličané, Češi-Francouzi, -Španělé, -Poláci, -Rusi a -Němci (což nemusí být zradou na národu). Zračí se v tom obzvláštní pochopení jiné národní kultury umožněné dokonalou znalostí jazyka, života i citovým vztahem příbuzenským. Postup je takový, jak ukazuje případ mého známého K., který byl svou firmou vyslán do Španělska. S despektem o něm mluvil, znal francouzsky a německy, nikoliv španělsky. Cestou zastavil se v Paříži a učinil si zde náhodou ohnivou známost, která náhodou byla Španělkou. Dnes je K. úplný Španěl. Kde je v tom důkaz pro prevalenci španělské kultury?

Dr. Čestmír P a r m a.

Slovník obchodně-technický, účetní a daňový. Sešit čís. 10—12/V. obsahuje: Legalisace, Legitimační papíry - Letecká doprava - Lhůty - Licence - Lih a j. Příloha: Slovník obchodních zkratk, výrazů, rčení a cizích slov. Vydávají Tiskové podniky Ú. S. Č. P., Praha I., Masarykovo náměstí. 4. Cena Kč 19.50.

Novinová sazba povolena Ředitelstvem pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINÁŘ NYMBURK.